Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 20 — Trimonata

4/90

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktisto: István Ertl

Teknika redaktisto: Stefan MacGill

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2920 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Esperanto-fako, Universitato ELTE/BTK
H-1364 Budapest, Pf. 107
☎ + 36-1-1180-966/185

Presado: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

Enhavo

Enhavo

NUNEZ, Antonio Alonso, *Internaciaj Preuniversitataj Kursoj* 1
BARCSAY, Zsuzsa, *8a Internacia Metodika Seminario, Kaunas* 4
Resumo pri la Internacia Seminario en Bad Saarow, majo 1990 8
Donacoj al Fondaĵo Szerdahelyi de majo ĝis oktobro 1990 12
KLAG, Walter (trad.) *Nur angle parolata ĉi tie; usona lingvo-politiko* . . . 13
KOUTNY, Ilona kaj VARGA-HASZONLITS, Zsuzsa, *Diplomlaboraĵoj de la Universitato ELTE en Budapeŝto (1988-90)* 14
GRUNER, Horst, *Recenzo pri lern-materialo por 'Gerda malaperis'* 19
Statut-propono por nia Ligo (Estrara propono de majo 1990) 20
Postskribo decembra pri la statut-proponoj 26
ILEI labortable (telegrafstile pri lastaj evoluoj) 27
SHAO Rong, *Pri verkadaj principoj por la Lernolibro de Esperanto en Sciencoj kaj Teknikoj* 28
DE ARAUJO, Fernando, *Interlanda seminario en Brazilo* 32
MacGILL, Stefan, *Enkonduko al la kadra temo de la 25a ILEI-konferenco* 33
KOVÁCS, Márta (trad.), *La fervoja linio de Flåm* 35
Informoj, novaĵoj (de niaj sekcioj kaj aliaj aktivuloj) 36
Ni mencias (koncizaj resumoj pri ricevitaj eldonaĵoj) 39

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto : Edward Symoens, Putsesteenweg 131/A, B-2920 Kalmthout; telefono (03) 666.62.66 — Kunordigado, informado en pedagogiaj medioj, rilatoj kun Unesko kaj UEA.

Vicprezidanto : Stefan MacGill, Esö 7.III, H-1034 Budapest Tel. (01) 1351-531 (laboreje) — Internaciaj ekzamenoj kaj iliaj kursoj, statistikado de instruado, internaciaj lerniloj, lerneja projekto, IPR.

Ĝen. Sekretario : *Vakas — provizore la vicsekretario traktas la laboron.*

Kasisto : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby; tel. (0415)-501 52 — Financaj rilatoj kun sekcioj, konferenco, k.a.

Vicsekretario : Malcolm Jones, 41 Causeway, GB-SN 15 3DD Chippenham; tel. (0249) 656041 — Venonta konferenco, lernejana korespondado, unuecigo de naciaj ekzamen-sistemoj.

Membroj : Till Dahlenburg, Feldstr. 13, D-O-2722 Brüel; tel. (09-8576)-528 — Gvido de pedagogia komisiono, internaciaj ekzamenoj, metodikaj kursoj.

Zang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normal Univ., 430070 Wuhan, Ĉinio — Evoluo kaj fondo de sekcioj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko.

INTERNACIAJ PREUNIVERSITATAJ SOMERKURSOJ EN ESPERANTO

Antonio Alonso Núñez, Hispanio

(1) La ĉefa celo de tiu ĉi projekto estas muntado de periodaj INTERNACIAJ PREUNIVERSITATAJ SOMERKURSOJ EN ESPERANTO, kies unua sesio okazu en 1993, paralele al la 78a Universala Kongreso de Esperanto (en Valencia, Hispanio). Laŭ la plano, en la Kursoj partoprenos internaciaj teksto-aŭtoraro, profesoraro kaj lernantaro. La efektiva nivelo, kiun la projekto atingos, ja dependas de la grado de kunlaborado fare de profesoroj, fakuloj kaj terminologoj diverslandaj, kiuj uzas Eon, kiel ankaŭ de la instituciaj kaj financaj apogoj, kiujn oni atingos.

(2) Skemo de la taskaro (tuta je internacia nivelo), kaj kalendaro:

1) Selektado, adaptado aŭ redaktado de tekstoj uzotaj en la Kursoj, kaj ties eldonado (1985-1993).

2) Instruado de Eo al volontulaj geinstruistoj, kiuj poste instruos mem tiun lingvon al volontulaj gelernantoj (1989-1992).

3) Libervola studado de Eo fare de gelernantoj 12-18-jaraj (1990-1993).

4) Eventuale, iuj gelernantoj ekstudos alian fremdan lingvon (1991-1993).

5) Laborkunvenoj de la internacia kunordigantaro de la projekto (90-93).

6) Eventualaj interfratiĝoj de studento-grupoj (1991-1993).

7) Eventualaj Eo-apogkursoj pere de amaskomunikiloj (1992-1993).

8) La gelernantoj trapasos ekzamenon pri Eo kaj, eventuale, ankaŭ pri la dua fremda lingvo (1993).

9) Unua sesio de la Kursoj (1993).

10) Diplomado kaj fina internacia oficiala informo kun konkludoj, proponoj pri la estonteco de la Kursoj, k. s. (1993).

(3) Kelkaj notoj pri la projekto.

— Principe, la Kursoj ofertu programojn pri diversaj temoj, tiel ke la gelernantoj povu elekti laŭ siaj interesoj aŭ plaĉoj (matematiko, fiziko, kemio, biologio, geografio, historio, juro, filozofio, literaturo, e-ologio ktp.). La komenca ofertaro, tamen, ja dependos antaŭ ĉio de la ĝis tiam disponeblaj libroj kaj de aliaj cirkonstancoj.

— Objektoj de speciala atento kaj zorgo estu la humanisma enfokusigo de ĉiuj temoj, la sistema konstrastigado de klasikaj kaj modernaj konceptadoj en scienco kaj de diversaj juraj sistemoj, la mondismaj konceptado kaj edukado, k. s., tiel ke ni disponu bazan bibliotekon por preuniversitata nivelo, ne nur ri-

goran laŭ faka vidpunkto, sed ankaŭ riĉan je etikaj valoroj kaj provizantan demokratian alireblecon al scioj.

– Pluraj el la verkoj de la katalogo de diversaj institucioj de Eo-uzantoj (UEA, Someraj Universitataj Kursoj, Scienca Eldona Centro, k. a.) estas jam rekte utilaj por la projekto, kaj aliaj bezonos adapton al ties celo kaj nivelo. Plurajn aliajn oni tradukos el aliaj lingvoj. Tamen, la plejparto el la bezonataj studkajeroj estos rekte verkitaj por la projekto.

– La tuta projekto estas universitata tasko sen profita celo. Tial, la verkistoj fordonas la kopirajton al la projekto mem.

– Pro garantio de la korekteco de la financaranĝoj kaj de aliaj aferoj, la tuta projekto restas submetita al la oficiala kontrolsistemo de la Universitato de Santiago de Compostela, kiel ankaŭ al ĉiuj aliaj kontroloj utilaj, necesaj aŭ konvenaj laŭ decido de eventualaj mecenatoj kaj de la starigenda internacia kunordigantaro de la projekto.

(4) Pri malvolvo de la Kursoj:

a) Ĉiu unuopa kajero provizos studmaterialon por unu semajno. En ĉiu nova semajno laŭeble instruos nova profesoro, laŭeble el ĉiufoje malsama lando.

b) La profesoroj estos gastigataj de la Kursoj, sed ne salajrataj. Pri vojaĝoj al kaj el la kursejo zorgos ili mem, prefere per subvencio de la propra universitato aŭ de alia institucio (kio principe estas helpo facile atingebla).

c) La gelernantoj loĝos laŭeble kune en unu sama studenta hejmo, por ke la internacia kunvivado estu grave riĉiga. Ili devos pagi la librojn, kursokoston, gastigadon, k.s. Aldone al la ebleco, ke la studentoj serĉu mem stipendion, la kunordigantaro de la Kursoj klopodos trovi kiel eble plej ĝenaralan solvon al stipendiado.

d) Selektado de tekstoj, aŭtoroj, profesoroj kaj gelernantoj; fiksado de kalendaro, decidoj pri eldonkvantoj k.s., okazos per procedo ĉiupaŝe pli perfekta, komence fare de personoj libervole aliĝintaj, kaj poste per regularo grade starigota de la kurso-kunordigantaro.

e) Laŭ la plano, la Kursoj precipe okazu en Santiago de Compostela. Tamen, nenio malhelpas, ke – se bezone aŭ utile – ili okazu ankaŭ en pluraj aliaj lokoj en unu sama jaro.

f) Ni devas objektive antaŭvidi, ke la unua(j) sesio(j) montriĝos iom neperfekta(j). Tamen, ili probable estos akcepteblaj en si mem, kaj bona bazo por postaj, pli perfektaj evoluŝtupoj.

(5) Aliaj taskoj en la projekto aŭ rilatigeblaj al ĝi:

a) La komenca projekto simple antaŭvidis kolektadon en unu saman kursejon de ĉ. 100-150 gelernantoj el diversaj landoj, sendendaj de diversaj instruistaj kunlaborantoj. Poste, pluraj sugestoj venis, ke laŭeble oni interrilatigu la projekton pri la Kursoj kun aliaj laboroj analogaj al ili.

Du el tiel parencaj aranĝoj estas la "Someraj Universitataj Kursoj en Esperanto" (Universitato de Liège) kaj la kampanjo "Komunikado en la Eŭropa Komunumo" nun malvolvata en la 12 Komunumaj landoj fare de ILEI (*fare de Eŭropa Esperanto-Unio – la red.*).

Ĉar kunlaborado inter ĉiuj tiaj aranĝoj povos nur alporti gajnon al ili, tial espereble tia kunlaborado estiĝos. Por ekzemplo, la citita Kampanjo alportus al la Kursoj pli grandan kvanton da studentoj, kaj aliflanke la Kursoj povos proponi al la junularo rektan kaj tujan profiton el Eo-studo.

b) Ju pli ampleksaj estos la ĵus cititaj taskoj kaj kunlaborado, des pli variaj kaj riĉaj povos iĝi diversaj akompanaj provoj: kontrastiga studo de la ecoj de malsamaj lernolibroj pri Eo, ripetado je pli granda skalo de la studoj kaj eksperimentoj pri la relativa facileco kaj propedeŭtika valoro de Eo por posta studo de aliaj fremdaj lingvoj, komparaj rezultoj de la ordinaraj Eo-kursoj kaj tiuj kun "ĉena aranĝo" (t. e., ke la instruistoj de Eo komencu la instruadon antaŭ ol ili fakte mastras la lingvon, profitante de la avantaĝoj de la retronutro tiele ŝprucanta), kontrastiga studo pri la investoj bezonataj por ellernado de Eo kaj de aliaj lingvoj (mono, tempo, rimedaro, instruistaro, ktp), ebleco de enkonduko de Eo-studo kaj -aplikoj en la programoj de t.n. pedagogia renovigado, ktp.

c) Apoge al la ordinaraj Eo-kursoj, estus utile prezenti aliajn, pli leĝerajn, en la amaskomunikiloj. Se la projekto trovos adekvatan apogon institucian, oni povos pli facile kaj kun probablo de sukceso sin turni tiucele al difinitaj radiostacioj kja ĵurnaloj. Plej grava tiurilate estus Eo-televidkurso. Antaŭ du jaroj oni komencis kunlabori tiucele en pluraj eŭropaj landoj, kaj Venezuela Eo-Asocio traktos dum la Havana Universala Kongreso pri la ebleco munti tian kurson por hispanlingvaj landoj. Ni esperu, ke tiaj planoj realiĝos, danke al ĉies kunlaborado kaj al institucia apogo.

(6) Institucioj de la uzantaro de Eo, al kiuj estas sendita tiu ĉi unua numero de la informilo, kaj de kiuj ni petas diskonigi la projekton al siaj membroj kaj publikigi pri ĝi en siaj organoj. Ni danke ricevos de tiuj kaj alicelaj institucioj, ankaŭ de iliaj membroj aŭ de aliaj personoj, ĉian sugeston, proponon, kunlaboron aŭ helpon por la bona malvolvo de la projekto, tiel en la propra lando aŭ institucio, kiel laŭ ĝenerala vidpunkto. Ni dankos, por la kazo de oficialaj kaj similaj skribaĵoj, ke la nacilingvan tekston akompanu traduko en Eo. Ni dankos ankaŭ, ke la privatajn leterojn ĝis nun senditajn al ni, oni laŭeble ŝanĝu al oficialaj (de universitatoj, administraj instancoj, kulturaj asocioj, ks.). Ni petas, ke ĉiuj tiaj leteroj ne plu estu sendataj al la iniciatinto de la projekto, sed al: *Curso de Esperanto, Instituto de Idiomas, Praza de Mazarelos, s/n.*
E-15703, Santiago de Compostela, Hispanio

La tekston de la aludita unua informilo ni publikigas nur duone, esperante kapti la esencon kaj konvinkitaj pri la graveco de la iniciato. Ni ŝatus, se ankaŭ la paĝoj de IPR fariĝus unu el la preparejoj por la realigo de tiu ĉi ambicia projekto – La red.

8a Internacia Metodika Seminario

5a ĝis 11a de novembro 1990, Kaunas

La 8-an IMS organizis Litova E-Asocio. La seminario estis ĝustatempe anoncita en la gazetaro (inkl. IPR); ankaŭ individuaj invitoj kaj informoj venis je adresoj de partoprenintoj en antaŭaj seminarioj. La kadrotemoj de la seminario laŭ la decidoj de la 7a IMS estis:

1) Teoria temo: Ĝeneralaj psikologiaj faktoroj en la fremdlingvo-instruado: rolo de konigaj, afekciaj kaj volaj procezoj (temo el la lingvopedagogia kurso de ILEI)

2) Praktika temo: Enlingvaj interferoj en Esperanto: ilia instruado praktike (modellecionoj, bazitaj sur kaj enkondukotaj per lingvistikaj kaj metodikaj principoj)

3) Kaj teoria kaj praktika temo: La rolo de lernolibro kiel ĉefa instruhelpilo en la instru-procezo; kompletigaj instruhelpiloj (prezento kaj analizo de ekzistantaj aŭ pretigataj instruhelpiloj)

La fakan programon konsistigis 17 prelegoj kaj unu kvazaŭ-leciono, laŭteme jene:

Kadrotemo 1: Psikologiaj faktoroj:

1.1 KOVÁCS [Kovaĉ] Márta (H): Teleinstruado de Esperanto: psikologiaj kaj enhavaj problemoj;

1.2 Marta MARTONOVA (ĈS): Kelkaj novaj tendencoj en la instruado de fremdaj lingvoj inkluzive Esperanton: psikologiaj tendencoj en intensaj kursoj;

1.3 Marin BACEV (BG): La sugestopedia metodo de Lozanov;

1.4 Marin BACEV (BG): La BO-metodo: instru-sistemo de la preleginto mem;

1.5 NAGY [nadj] Kornelia (R): Eduku geniulojn: eksperimento en Budaörs (H) por element-lernejanoj kun intensa lernado de fremdaj lingvoj, inkl. Esperanton kaj de matematiko, inkl. sorobanon.

1.6 Svetlana POGORELAJA (Ukr.): Rapida instruado de fremdaj lingvoj: logika metodo, instruado de kelkaj lingvoj samtempe;

1.7 Svetlana POGORELAJA (Ukr.): Konsiloj al komencantaj instruistoj de Esperanto;

1.8 Adomas VAITILAVIĈIUS [vajtilaviĉjus] (Lit.): La kurso finita. Kion fari plu? Tradukita kurso koresponda;

1.9 Irena SZANSER [ŝanser] (PL): Semantikaj tendencoj en la lingvo-didaktiko kaj la didaktika laboro de la semantikaj verbo-funkcioj;

1.10 Irena SZANSER (PL): La semantika sintezo de la E-gramatiko en la instruado;

1.11 Vladimir TODOROV Ĵ ELEV (BG): Instruado de Esperanto inter nevidantoj;

1.12 Ernesto GELETA (ĈS): La multvizaĝa E-instruado ĉe la plej diversaj cirkonstancoj.

Kadrotemo 2: Enlingvaj interferoj

2.1 BARCSAY [barĉai] Zsuzsa (H): Participoj kaj kompleksaj verboformoj: sistemigo de la konoj por progresintoj;

2.2 Irena SZANSER (PL): La ŝanĝoj de la verbofunkcioj per -ig kaj -iĝ ;

Kadrotemo 3: Lernolibroj

3.1 Rumjana JANEVA (BG): Ekzistantaj kaj pretigataj lerniloj en Bulgario

Informaj prelegoj

4.1 Nina ALEKSANDROVA (Lit.): Strategiaj aspektoj de lingvo-instruado en E-kursoj ĉe la Litova E-Asocio;

4.2 BARCSAY Zsuzsa (H): Loko de E en la sistemo de lerneja fremd-lingva instruado en Hungario;

4.3 Marin BACEV (BG): E-instruado en Kubo;

4.4 Jaroslaw PARZYSZEK [paĵišek] (PL): Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino kaj Bjalistoko.

Estis dissendita provizora programo; surloke venis pliaj proponoj. Ĉiuj estis akceptataj kaj realigataj (escepte de unu pro bedaŭrinda forgeso flanke de mi - B.Zs.)

Ne estis ebleco anticipe prijuĝi la enhavon, amplekson kaj fakan nivelon de la preleg-proponoj, krome estis diversaj dezirespримoj pri tempopunktoj flanke de la kontribuintoj, pro tio ne eblis elformi temogrupojn. Tio ĝenis ankaŭ la diskutadon. La interŝanĝo de opinioj estis tre vigla kaj sincera, kelkaj eĉ neglektis ĝentilecon provokante respondojn.

Krom la faka prelegaro okazis ankaŭ aliaj programeroj:

- Petras ĈELIAUSKAS (Lit.) prof. de matematiko kaj art-tradukisto, ĉiutage regule prezentis tre interesajn lecionojn pri la litova lingvo (historio, priskriba gramatiko, bazaj esprimoj por eksterlandanoj) kaj donis superrigardon pri la litova literaturo kaj deklamis poemojn aŭ fragmentojn en lia traduko al Esperanto.
- NAGY Kornelia gvidis rapidan kurson pri kalkulado per la japana sorobano (interfero kun la rusa kalkulilo, kiun oni vaste uzas ankaŭ en Litovio).

• Erikos LAICONAS, profesia E-ĉiĉerono gvidis duontagan ekskurson tra Kaunas kun aparta konsidero pri Silbernikaj kaj Zamenhofaj memorlokoj, krome pri historiaj kaj nuntempaj politikaj eventoj. Muzeojn (ekz-e la faman Ĉiurlionis-muzeon kaj tiun de bildigo de la diablo) oni povis spekti dum liberaj horetoj.

Du kulturaj vesperoj okazis: en la unua slovakia folklora danc- kaj muzikensemblo prezentis unike imponan programon kun riĉega kostumaro; en la alia rusa E-ista kantisto kun gitaro kaj latvaj e-istaj kantistinoj amuzis la publikon. Okazis ankaŭ interkona kaj adiaŭa vesperoj, kvankam por interkonatiĝo la unua ne taŭgis.

Nek la malfermon nek la programon vizitis reprezentanto de iu loka kleriga instanco, sed la Litova Radio faris mallongan intervjuon, krome okazis gazetara konferenco, en kiu – post ĝenerala informo flanke de la unua vicprezidanto de LEA, s-ro Povilas JEGOROVAS – la ĵurnalistoj demandis diverslandajn seminarianojn pri la E-movado kaj -instruado en iliaj landoj. Manke de reprezentanto de la estraro de ILEI, en la gazetara konferenco BARCSAY Zsuzsa donis respondojn al demandoj pri la Ligo.

Porokaza komisiono, kiu konsistis en P. Ĉeliauskas (Lit.), N.S. Pogorelaja (Ukr.), B. Rozenfelde (Latvio), I. Gonĉarova (Rusio), S. Pogorelaja (Ukr.), E. Geleta (ĈS), I. Szanser kaj J. Parzyszek (PL) kaj Barcsay Zsuzsa surbaze de publikaj opinioj de la ĉeestintoj – faris la jenajn *konstatojn kaj konkludojn:*

La 8a IMS estis ĝis nun la plej grandnombra: partoprenis ĝin dum la tuta daŭro 67 personoj (BG 5, ĈS 3, H 3, Korea Resp. 1, PL 14, R 1, Estonio 2, Latvio 5, Rusio 9 kaj Litovio mem 22), krome instruistoj kaj kursgvidantoj vizitis la seminarion nur tempoparte, do la sumo de partoprenantoj estis ĉ. 100. La lingva nivelo de la partoprenantoj superis tiun de la ĝisnunaj IMS: ĝi estis imprese alta. La lokaj objektivaj cirkonstancoj (distancoj, ejoj, ekipaĵo) ne estis kontentige favoraj, tamen neniu dubo restas pri la maksimuma klopodado kaj bona intenco de la organizantoj. Tion pruvas ekz-e la luksa manĝigo de la partoprenantoj. Komplete malhelpis la interkonatiĝon kaj plurajn kontaktojn la manko de nomlisto kaj adresaro de la seminarianoj.

Rekomendoj por venontaj seminarioj:

Organizaj

Loĝado, manĝado kaj programoj okazu laŭeble en la sama loko, sed almenaŭ tre proksime unu al la alia. La prelegejoj apartenu al lernejo aŭ universitato, kie ĉiuj necesaj ekipaĵoj estas je dispono (de kreto kaj tabulo ĝis komputilo). Kiel estis en Litovio, ankaŭ estontece la IMS okazu en periodo,

kiam en la gastiganta lando/regiono estas lernejaj ferioj, por ke surlokaj instruistoj povu veni grandnombre.

Enhavaj

• La prelegproponojn prijuĝu faka komisiono surbaze de anticipa skriba skizo fare de la prelegonto.

• La organizantoj instigu prezenti praktikajn instruhorojn surbaze de scienca teorio kaj laŭeble disponigu verajn lernantojn. Modellecionoj kaj prelegoj daŭru strikte 20 minutojn.

• La kadrotemoj estu pli detale disvolvataj en la seminarioj.

• La seminario rekomendas al ILEI, ke [illegible] proponu lingvokurson kaj metodikan kurson, krome landajn kaj regionajn E-pedagogiajn konferencojn en landoj, kie ĝis nun ili ne povis regule okazi.

• Okazu intensa instruado de Esperanto surloke dum la IMS.

• Lingvokurso pri la ŝtata lingvo de la gastiganta lando estas dezirinda.

• La 9a IMS okazu en Rumanio, se estas eble en la universitato de Timisoara aŭ aliloke, kie la organizado estas garantiata: en aprilo 1991 (por reveni al la kutima tempo).

• La temoj de la 9a IMS estu:

1. Terminologio de E-lingvo-pedagogio
2. Intensaj lingvokursoj en E por komencantoj kaj progresantoj

Estas rekomendinde, ke okazu paralele dusemajna lingvo- kaj/aŭ metodika kurso, kiu komenciĝu unu semajnon antaŭ la IMS. Partoprenontoj estas petataj kunporti lernolibrojn kaj aliajn lernilojn cele al ekspozicio.

Kaunas, 1990-11-10
Zsuzsa Barcsay

Intertempe prof. d-ro I. Bociort en la nomo de Rumana Esperanto-Asocio konsentis okazigi la 9-an IMS en Odorhen Secuiesc (Székelyudvarhely), en aprilo 1991, kiam estos lernejaj ferioj. Respondeca organizanto estas s-ino NAGY Kornelia. Informilon kaj aliĝilon peti ĉe la Hungara Sekcio de ILEI: KOVACS Márta, Ady Endre u. 23-25 C, H-1221 Budapest. Estos ege dezirinde allogi seminarianojn ankaŭ el okcidenta Eŭropo kaj el aliaj landoj, en kiuj oni ankoraŭ ne malkovris ĉi tiun jam tradician fake altnivelan aranĝon.

ESPERANTO – OBJEKTO DE AKADEMIA ESPLORO KAJ INSTRUADO

Pri la Internacia Seminario en Bad Saarow, Germanio, 27 apr. - 2 majo 1990

La lasta el la tradiciaj GDR-seminarioj en Bad Saarow pritraktis temon, kiu koncernas IPR-n. Ĉi-loke ni donas nur "resumon de la resumo", laŭ kondensigita teksto de la prelegoj, kiun la ĉeestantoj ricevis. Por la tuto oni eble turnu sin al la ĉeforganizanto, D-ro Detlev Blanke, *Otto-Nagel-Str. 110, Pf. 113-05, Berlin O-1141, Germanio.*

Detlev BLANKE, GDR: *Enkonduko al la seminaria temo; Interlingvistiko kaj Eo en la akademia pejzaĝo de GDR*

La interlingvistika kaj e-ologia temaro havas strategian valoron por la E-movado. Ĝi helpas malkonstrui antaŭjuĝojn en la "ekstera" mondo kaj en la E-a medio mem. La internacia situacio ne estas tre esperiga: relative malmultas sciencaj publikaĵoj, mankas kunordigado kaj interŝanĝo de spertoj.

En GDR, interlingvistiko ekviglis en 1970. Aparte atentinda estis la vico de 9 internaciaj fakaj seminarioj en Ahrenshoop kaj Bad Saarow (1979-1990) kaj la serio de 9 interlingvistikaj (ne-e-istaj) seminarioj en Ahrenshoop (1979-1988). Favora sinteno en lingvistikaj rondoj, atingita per konsekvenca laboro, ebligis enigi la temaron en la programon de la 14-a Internacia Kongreso de Lingvistoj (1987, Berlino) kaj establi la fakon Interlingvistiko en la Univ. Humboldt en Berlino (docento d-ro Blanke).

Sabine FIEDLER, GDR: *Pri la projekto de internacia universitata Eo-lernolibro kaj unuaj spertoj dum ties uzado*

Pri la projekto ni raportis en IPR. La preta lernolibro, antaŭ publikiĝo, estas transiranta dujaran testfazon, kiu jam komenciĝis. La unuaj spertoj estas ĉefe pozitivaj.

Ilona KOUTNY, Hungario: *Eo-fako de la Budapeŝta Universitato Eötvös*

La temon ni konstante sekvas en IPR.

Prof. d-ro Ignat BOCIORT, Rumanio: *La strategia signifo de akademia kaj universitata Eo-agado por la disvolviĝo de Eo-movado (per rumanaekzemplo*

Dum la lastaj 20 jaroj, la rumana movado trapasis plurajn fazojn: severa malpermeso (1970), unuaj sukcesoj (1975), gravaj sukcesoj (1978-1984), denove malpermeso (1985-1989), estiĝo de Rumana Eo-Asocio kaj de Tutlanda Universitata Eo-Centro post la revolucio. En tiu ĉi dinamiko, ankaŭ la sciencistoj grave rolis – kaj pozitive kaj negative. Oni povas aserti, ke en rumanaj universitatoj la kontraŭ-E-a sinteno estis tradicia (esceptoj malmultis). En 1970 naskiĝis en la Univ. de Timisoara multflanka reago kontraŭ ĉi tiu situacio. Per publikigado de sciencaj artikoloj, per prelegoj ktp. oni sukcesis konvinki plurajn sciencistojn (kaj politikistojn) kaj enkondukigi E-on en la filologiajn fakultatojn, en la Akademion pri Sociaj Sciencoj ktp. Tamen, en 1985, kun la "helpo" de iuj sciencistoj, la ministerioj pri klerigado kaj kulturo malpermesis denove la E-kursojn. La revolucio alportis liberon ankaŭ por Eo. Dank'al la konvinkpovo de la scienco kaj al la sociaj ebloj de sciencistoj, la movado en Rumanio unuiĝis, pligrandiĝis. Konklude, oni klopodu ne nur enkonduki E-on en la sciencon, sed ankaŭ enkonduki sciencon kaj sciencistojn en la tutan E-agadon.

D-ro Werner BORMANN, FRG: *Akademio Internacia de Sciencoj (AIS) kaj Akademio de Esperanto (AdE), raporto el propraj spertoj pri atingoj kaj necesoj; Germana Esperanto-Instituto (GEI)*

AIS laboras nun de kelkaj jaroj. Ĝis nun nur relative malmultaj studentoj akceptis la oferton studi sciencan fakon en Eo. Plivastigon bremsas la mallarĝa gamo de instruantoj kaj la neceso pagi ĉion en okcidenta valuto. Mi mem devis solvi la terminologian problemon de mia fako: ekonomiko. Kvankam ĝiaj fenomenoj estas ĉiutagaĵo, ankoraŭ mankas stabila vortuzo. Al ĝia evoluo bonvene kontribuas AIS. Ankaŭ AdE povus esence kunagi en tiu gravega tasko. Mi imagas AdE definitivigi fakvortojn. Kompreneble tio efikos nur se la lingvouzantoj respektos tiujn kondiĉojn. Tio dependas de la ofteco de la aplikado. AIS estas tiu institucia ebliganto de faklaboro, kiun Eo do urĝe bezonas.

Elena ŜEVĈENKO, Sovetio: *Interlingvistiko kaj e-ologiaj aktivecoj en Sovetio; Asociaj kampoj en Eo*

La du centroj de la agado estas:

– la Instituto pri Lingvoscienco de la Soveta Akademio de Sciencoj en Moskvo, dank'al i.a. M. Isaev, D. Lukjanec, B. Kolker, L. Mjasnikov, S. Kuznecov, I. Zajgin, E. Ŝevĉenko;

– la Univ. de Tartu, sub gvido de prof. A. Duliĉenko.

Asocia eksperimento estas unu el la specoj de psikolingvistikaj eksperimentoj: oni proponas al la submetitoj liston de stimul-vortoj kaj petas doni la reagvorton, kiu en ilia kapo asociiĝas kun la prezentita listo. La teoria valoro estas la esplorrezultoj pri la strukturo de lingva pensado kaj la pliĝustigo de la semantikaj kampoj de la vortoj. Praktika valoro povus esti ellaborebla asocia vortaro, bazita je la 500 plej ofte uzataj vortoj. Por la realigo mi bezonus volontulojn, kiuj kontaktu min je Litovskij bulvar 13/12-581, SU-117593 Moskvo.

Alicja SAKAGUCHI, FRG: *Pri la novdataj interlingvistikaj esplorprojektoj kaj instruarangoj en la Univ. Frankfurt (Main)*

Okazis raporto i. a. pri

1. seminario pri problemoj el la interlingvistika sfero, kun averaĝe 30-40 studentoj;
2. projekto de disertacio, kiu celas trakti difinon de la objekto de interlingvistiko, la rilatojn inter semiotiko, lingvistiko kaj interlingvistiko, la lokon de interlingvistiko en lingvistiko;
3. esplorprojekto por komentite eldoni la nepublikigitan pazigrafian lingvoprojekton de la dana lingvisto R. K. Rask.

Eva BOJAĜIEVA, Bulgario: *Ideoj pri Eo-instruado kaj praktika uzado de la lingvo*

La instruado de Eo devas esti parto de harmonia, vivkapabla organismo, kies partoj ekzistas, sed mankas centra kunordiga instanco. Ĝi povus esti Konsilantaro, al ILEI aŭ aparte, el reprezentantoj de ĉiuj organizaĵoj ligitaj iel kun la instruado de Eo kaj la praktika uzado de la lingvo, ekz. ILEI, ISAE, AIS, TEC, TEJO ktp. Ĝi kunordigu la laboron pri ĉiuj eroj de la procedo.

Fani MIHAJLOVA, Bulgario: *Instruado de Eo en altlernejoj de Bulgario*

En preskaŭ ĉiuj superaj lernejoj en Bulgario funkciis E-kursoj en la lastaj 2-3 jardekoj. En la lasta studjaro (1989-1990) Eo estis fakultative instruata en tri superaj lernejoj: en la universitatoj de Sofio kaj Veliko Tarnovo kaj en la Supera Pedagogia Instituto en Ŝumen.

Katalin SMIDÉLIUSZ, Hungario: *Nuntempa situacio de Eo-instruado en Hungario*

Ekde sept. 1989 la rusa lingvo ne plu estas deviga en la hungaraj lernejtipoj. Pro la manko de kompetentaj imstruistoj ne ĉie eblis eluzi la bonan eblon por disvastigi E-on. Laŭ statistiko en la nuna jaro ĉ. 2600 personoj lernas E-on en organizitaj formoj, i. a. en du universitatoj (Budapest, Debrecen) kaj tri Pedagogiaj Altlernejoj (Sárospatak, Eger, Szombathely). En la lasta ekfunkciis, ekde sept. 1990, ankaŭ faka eduko por instruistoj de Eo.

János BÁNYÁSZ, Hungario: *Eblecoj kaj rezultatoj en la altlerneja Eo-instruado*

La motivado por lerni E-on estas potenciale pli forta ol antaŭe. La privilegio de la rusa lingvo, ĝis nun deviga, ĉesis, sed baldaŭ pruviĝos, ke ankaŭ la alproprigo de aliaj "grandaj" lingvoj ne prosperas pli rapide.

Werner HOCKE, GDR: *Pri la situacio de la Eo-istruado en la Pedagogia Altlernejo Magdeburg - kelkaj problemoj kaj proponoj*

La gestudentoj postulas agnoskon de Eo kiel fakultativa instrufako de ĉiuj lernejoj laŭ la ekzemplo de kelkaj landoj (Aŭstrio, FRG, Bulgario k. a.), en kiuj oni envicigis E-on inter la instrueblajn fakojn, se la premisoj ekzistas.

Dr. W. M. SCHWARZ, GDR: *Rondo de Amikoj de Eo en la Universitato — ĉu taŭga hobio? Unuaj spertoj el Dresdeno*

Temas pri rondo de personoj, kiuj intencas subteni la disvastigon de Eo malgraŭ tio, ke ili mem la lingvon preskaŭ ne aŭ nur limigite aplikas.

Katrin MATTUSCH, GDR: *Iniciativo: junulara fakagado en Eo*

La nombro de junaj e-istoj, kiuj volas ligi siajn fakajn interesojn kaj E-on, kreskas. La iniciativo, konsiderante tion, alcelas i.a.:

- organizi internaciajn E-fakseminariojn;
- iniciati kaj patroni esplor-projektojn, kies rezultoj estas diskonigataj dulingve;
- pritrakti "teknikajn demandojn" (ekz. kiel prelegi en E-ujo, al kiu E-fak-organizo sin turni ĉe specialaj problemoj);
- subteni kaj prizorgi E-kursojn en universitatoj;
- iniciati junularan fakan gazeton.

Andrzej PETTYN, Pollando: *La instruado de Eo al studentoj (laŭ la ekzemplo de dujaraj kursoj en la duonsupera lernejo Studumo pri Stenotipio kaj Fremdaj Lingvoj en Varsovio)*

La preleganto substrekis, ke en sia laboro kun studentoj li komence prezentis diversajn formojn kaj teknikojn de memlernado citante la ekzemplon de famaj poliglotoj. Gravan lernomotivigan rolon ludis la parolekzercoj – la ĉefa instruformo, proksime ligitaj kun la studenta medio. En ĉiu semestro li elektis el la grupo la plej talentajn studentojn, kiuj post la akiro de kroma pedagogia diplomo povis ekinstrui la lingvon. Siajn metodikajn spertojn ĉi-rilate li grandparte aperigis en la internacia ekzercolibro "Eo en dialogoj", Varsovio, 1990.

Dr. Ronald LÖTZSCH, GDR: *Gramatikaj germanismoj en Eo*

Ofte rimarkeblas i.a.:

- uzo de la refleksiva poseda pronomo *sia* anstataŭ la nerefleksivaj *lia, ŝia, ĝia, ilia* aŭ inverse;
- uzo de la kondicionalo por esprimi nerektan parolon;
- tipe germana vortordo (predikato je la dua loko, konstruoj kun kadro);
- uzo de pasivaj participoj de netransitivaj verboj;

– uzo de refleksivaj kaŭzativaj formoj kun la helpverbo *lasi* en modalpasiva funkcio.

Wera BLANKE, GDR:
Terminologia Eo-Centro (TEC) – lastjara evoluo

Menciindas Terminologia Seminario en Poprad; membriĝo en la terminologia kunordiga organizo TermNet; ekesto de oficejo kun dungito (Ankica Jagnjiĉ en Zagrebo); evoluanta kunlaboro kun DLT; finpretigo de terminarproponoj pri aeronaŭtiko, stomatolgio, akustiko k. a. kampoj.

Detlev BLANKE, GDR: *Enkonduko al la diskuto "Perspektivo de la E-movado en orienta Eŭropo"*

Ĉu demokratiiĝo helpos aŭ malhelpos la movadon? Ĉu la orienteŭropa movado iam resolidiĝos kaj kapablos grave impulsi la tuteŭropan, aŭ ĝi fariĝos sensignifa lingva sekto?

Donacoj al Fondaĵo Szerdahelyi

Sumo je majo 1990: svedaj kronoj	3.486:87
Finna Sekcio	500:
Brazila Sekcio	95:
Josef Wesian, Aŭstrio	259:50
I.J. Svedio	100:
Sveda Sekcio	1.000:
Brita Sekcio	1.011:20
Testamente de Audrey Childs-Mee	8.649:
Sumo ĝis oktobro 1990:	15.101:57

Al ĉiuj donacintoj ni tre kore dankas.
Vi multe akcelas la antaŭenigon de nia laboro.

Nur angle parolata ĉi-tie
Lingvo kiel politiko kontraŭ enmigrintoj

Renate kaj Walter KLAG

20 milionoj el la 242 milionoj da usonanoj ne parolas angle. La lingvajn problemojn traktas artikolo en la usona gazeto TIME (Tempo) de la 5a de decembro 1988, paĝo 30. Sur foto oni vidas demonstracianton, kiu portas sloganan tabulon: „Official English is official racism" (Oficiala angla estas oficiala rasismo). Jen koncizigita traduko de la artikolo:

17 usonaj ŝtatoj reasertas la anglan kiel oficialan lingvon. Premgrupoj insistas:

a) Balotiloj estu nur angle presitaj;

b) Restrikti dulingvan edukadon al transira stato. Post 4–6-jara dulingva instruado oni vizitu normalajn lernejojn, en kiuj estas parolata nur la angla;

c) Plialtigi la anglalingvan nivelon de ontaj ŝtatanoj.

En hospitalo de Los-Anĝeleso (LA) la ĉefflegistino malpermesas al laboristoj paroli ne-angle kaj instigas denunci ĉiun, kiu ne parolas angle. La magistrato de antaŭurbo de LA maldungis bibliotekistojn ĉar ili aĉetis fremdlingvajn magazinojn kaj librojn. La manaĝero de asekura kompanio en LA ordonis al ĉin-usona dungito paroli nur angle krom kun ĉinaj klientoj.

Tiaj kaj aliaj okazaĵoj estis la sekvo de iniciato en Kalifornio antaŭ du jaroj igi la anglan oficiala lingvo. Ĝis antaŭnelonge lingvo, kiu kaŭzis militojn kaj ŝanĝis ŝtatlimojn, ne estis politika temo en Usono. Nun kreskanta nombro de Usonanoj sentas la neceson protekti sian gepatran lingvon. Balotantoj en Florido, Arizono kaj Kolorado aprobis similajn iniciatojn. Nun en 17 ŝtatoj la angla estas oficiala lingvo sur leĝa bazo.

La grupo „US English" (Usona Angla), kiu patronis la iniciatojn, iĝis grava politika forto pro tiuj sukcesoj. „US English" fondiĝis sub la gvido de la lingvisto S.I.HAJAKAWA, iama usona senatoro en Kalifornio kaj havas nun 350.000 membrojn. Ĝi celas al konstitucia amendo, kiu igu la anglan la oficiala lingvo de Usono.

Steve WORKINGS, la direktoro de registaraj aferoj de tiu grupo diras: „Lingvo estas unu el la raraj aĵoj, kiuj estas komunaj en Usono!" La grupo „US-English" postulas skriban ekzamenon pri la kono de la angla lingvo kiel kondiĉo por akiri la usonan ŝtatanecon. Ĝi ankaŭ rekomendas forigi dulingvajn balotilojn kaj altigi rimedojn por dulingva edukado, kvankam nur por mallongdaŭraj transiraj programoj. La grupo asertas, ke la kurantaj dulingvaj kursoj malsukcesas, ĉar ili tro malrapide forkondukas la lernantojn de ilia gepatra lingvo.

Kontraŭloj de la movado „Oficiala Angla" konsideras, ke tiu movado estas nenio pli ol incitado ksenofobiajn timojn en socie akceptebla maniero; ekzemple timon, ke enmigrintoj superus nombre la indiĝenojn; timon, ke enmingrintoj povus forpreni laboron ĉar ilin kontentigas malalta salajro; aŭ timon sole pri alies fremdeco.

Diplomlaboraĵoj pri esperanto

Sciencaj kaj modernaj studoj pri esperantologio kaj interlingvistiko apartenas al nia trezoro. Tamen ofte oni ne scias pri ili aŭ ne povas aliri ilin. Gratulinda estas la bibliografio kun resumoj de Symoens (Bibliografio de disertacioj pri Esperanto kaj interlingvistiko, UEA, 1989). Sed bedaŭrinde ĝi entenas nur kelkajn (16!) el la diplomlaboraĵoj verkitaj ĉe la Esperanto-fako (aŭ alia) de Eötvös Universitato en Budapeŝto.

Dum la 25 jaroj de ĝia ekzisto ĉ. 70 diplomlaboraĵoj kaj kelkaj doktorigaj disertacioj pretiĝis; ilia bibliografia prilaboro komenciĝis. El tiuj nun ni publikigas la rikolton de la lastaj 3 jaroj (ili estas konsulteblaj en la biblioteko de la fako). Ni planas aperigi almenaŭ parte la plej interesajn studojn sur la paĝoj de IPR. (En la venonta numero sekvos la laboraĵo de K. Stróbl pri komunikada instruado).

Tagaj studentoj pri Eo kutime havas ankaŭ alia(j)n fako(j)n; fine de la 5-a jaro ili devas prezenti diplomlaboraĵon pri unu el siaj fakoj. La diplomiĝo egalas pli malpli al magistriĝo. Fine de la postdiplomaj studoj ĉiuj devas pretigi laboraĵon (al tiuj ni metas asterikson). Gvidantoj kaj prijuĝantoj de la diplomlaboraĵoj estas KOUTNY Ilona (KI) kaj VARGA-HASZONITS Zsuzsa (VHZS).

1988: 1

KISFALUDY Katalin (1988): Apliko de sintezita parolo en la komputila instruado de Esperanto. IV + 111 p. (inkl. programlistojn) ĉe KI

Temas pri moderna tereno: komputila instruado, ne ofte traktata en Eo; apliko de sintezita parolo entute tre malofte aperas. La verkintino plenumis memstaran kaj pioniran laboron. Ŝi ne nur didaktike bone kunmetis materialon por komenca kurso en Eo, sed ŝi planis kaj ankaŭ ellaboris ekzercoprogramojn por komputilo Commodore aplikante la parolsintezan sistemon ESPAROL. La instruprogramoj estas esperantlingvaj, do taŭgaj por internacia uzo. El la enkonduka parto vidiĝas, ke ŝi konas la naciajn kaj internaciajn rezultojn ĉi-kampe kaj bone vidas la rolon de komputilo en la instruado. En la realigo de la bonega materialo aperas kelkaj pardoneblaj mallertaĵoj. Aperis raporto pri la praktika elprovo de la materialo en IPR 88/4.

1989: 11

BARTHA Emma (1989): Apliko de komputiloj en la procedo de instruado-lernado. 53 p. ĉe KI

La laboraĵo analizas la praktikan elprovon de la instrumaterialo de K. Kisfaludy en klasĉambro. Ĝi prezentas la efikon de la programoj ĉe la gelernantoj, la postan instruadon, baziĝantan sur ĝi, ĝi montras la avantaĝojn kaj

malavantaĝojn (ekz. neŝanĝeblo de tekstoj) de la programoj. Mankas tamen sistema traktado kaj proponoj por eviti la erarojn aŭ por alitipaj programoj.

BALLA Károly (1989): Esploro de la Esperanta leksiko (konsidere de la eŭropaj lingvoj). 215 p. (inkl. 180 paĝan komparan vortliston inter la lingvoj A, F, I, Hi, G kaj R) ĉe KI

La verkinto deziras pruvi la propedeŭtikan valoron de Esperanto per la esploro de leksiko de la gimnaziaj lernolibroj. La temelekto estas tre aktuala en la epoko, kiam post la unuaeco de la rusa lingvo en hungaraj lernejoj Eo figuras inter la unue elekteblaj lingvoj.

Li skizas la rolon de Eo en la fremdlingva instruado en Hungario. la detala komparo de la leksiko de fremdlingvaj lernolibroj kun tiu de Szerdahelyi disponigas utilan materialon por kolegoj, kiuj volas instrui fremdajn lingvojn baziĝante sur Eo. Balla pruvas per propraj statistikaj esploroj la fundamentigan rolon de Eo ankaŭ por la grek-latin-devena vortprovizo de aliaj studobjektoj. Etimologiaj analizoj kompletigas la komparan liston. La studo estas bone strukturita kaj klara.

SEREGHYné ZENGŐ Enikő (1989): Rolo de diversaj instruiloj kaj metodoj en la fremdlingvoinstruado (Esperanto) por 4-6 jaraj infanoj. 87 p. ĉe Zsuzsa Barcsay

La laboraĵo okupiĝas pri specifaĵoj de evolupsikologio de 4-6 jaraj infanoj (precipe surbaze de hungara literaturo), ĝi esploras la kvanton kaj kvaliton de instrumaterialo, la aplikeblajn metodojn kaj instruhelpilojn. Ĝi donas horskizojn kaj valoran krestomation.

La temo povas elvoki grandan intereson, ĉar pri infanĝardena E-instruado ĝis nun apenaŭ aperis studoj. La verkintino mem estas infanĝardenistino, tial ŝi povis kontroli siajn konstatojn kaj tekstoelekton en sia propra praktiko. La strukturo de la laboraĵo estas kontentiga, la lingvaĵo malpli perfekta.

NYILAS Éva (1989): Edmond Privat. 35 p. ĉe VHZS

La laboraĵo celas doni resumajn bildon kaj koncepton pri la verkaro de Privat, unu el la plej elstaraj figuroj de E-literaturo kaj historiografio. Tio ne vere sukcesis, ĉar la verkintino ellaboris malmultajn verkojn de Privat, kaj eĉ tiujn nur supraĵe. Tiel, kompreneble, mankas la teoriaj konkludoj kaj la laboraĵo estas malfacile taksebla.

GAJDOS Pál (1989): Giesswein Sándor, teologo, lingvisto, apostolo de la paco. 64 p. ĉe VHZS

Temas pri elstara studaĵo kaj enhave kaj forme. Ellaborinte la tre malmultajn disponeblajn fontojn, ĝi donas fidelan bildon pri la vivo kaj agado de Gi-

esswein, eminenta, multflanka personeco de la pioniraj tempoj de E-movado. La verkinto prezentas plurajn valorajn dokumentojn pri li.

BODNÁR Éva (1989): Verkaro kaj literaturaj verkoj de Jean Forge. 67 p. ĉe VHZS

La verkintino celis prezenti la vivon kaj la vivoverkon de unu el la plej interasaj kaj originalaj figuroj de E-aj literaturo kaj kulturo. Tio nur parte sukcesis. Estas pozitivaĵo, ke la laboraĵo baziĝas unuavice sur la studado de la verkoj, sed el tio sekvas mem la negativaĵo: tre malmultaj analizoj kompletigas la priskribon de la enhavoj de la unuopaj Forge-verkoj.

HAVASI József Zoltánné (1989): Otto Jespersen kaj la internacia lingvo. 35 p. ĉe VHZS

La verkintino ellaboris kaj analizis la vivoverkon rilate kun la artefaritaj lingvoj de unu el la plej konataj lingvistoj, patro de interlingvistiko. La laboraĵo enhave estas bona kaj riĉe dokumentita, tamen eblas riproĉi kelkajn formajn solvojn. Ŝajnas, ke ŝi ne estas sperta pri la logika redaktado kaj formulado de siaj pensoj. Bedaŭrinde, sufiĉe multaj lingvaj kaj stilaj eraroj malaltigas la kvaliton de la laboraĵo.

CSISZÁR Zsuzsanna (1989): Lingvistikaj skoloj kaj la artefaritaj lingvoj. 56 p. ĉe VHZS

La laboraĵo trarigardas la rilatojn, kontaktojn inter la plej gravaj lingvistikaj skoloj – historia lingvistiko, novgramatikistoj,strukturismo kaj genera lingvistiko – kaj la artefaritaj lingvoj. La verkintino atingis sian celon, ĉar ŝi sukcesis prezenti, eĉ pruvi, kial la reprezentantoj de la unuopaj lingvistikaj skoloj interesiĝis aŭ ne pri la arterfaritaj lingvoj. La argumentado estas logika, scienca; la studaĵo mem havas pioniran rolon.

ERTL István (1989): Lajos Tárkony kaj la Budapeŝta Skolo. 41 + 40 aldonoj p. ĉe VHZS

En la laboraĵo temas pri ege detala analizo kaj pritakso de la vivoverko de Tárkony, unu el la ĉefaj figuroj de E-literaturo kaj de Budapeŝta Skolo. Krom la merito resumi historie la temon, la verkinto kapablis doni ankaŭ estetikan prijuĝon, kaj prezenti la poezion de Tárkony kiel veran belarton, eternan valoron de E-kulturo.

DEMETER Anikó (1989): Sintaksaj problemoj en Esperanto (Pri la sintaksa konduto de modalaj verboj). 25 p. ĉe d-ino Katalin Horváth

La verkintino baziĝante sur la internacia fakliteraturo kaj esplorante konatajn Eo-vortarojn provis kolekti la modalajn verbojn kaj analizi ilian sintaksan kaj semantikan konduton. Ŝi konkludas, ke Eo kondutas simile al la naturaj

lingvoj ankaŭ ĉi terene. Ĝi estas valora kaj pionira laboraĵo.

D-ro MÁTHÉ Árpád (1989): Szemelvények a magyar és az eszperantó kémiai szaknyelv diakrón vizsgálatából [Fragmentoj el la diakrona esploro de la hungara kaj esperanta faklingvaĵoj] 29 p. ĉe d-ino Katalin Horváth

La verkanto kiel kemiisto jam delonge okupiĝas pri la kemia faklingvaĵo; ĉi tie li paraleligas la terminojn de la 105 kemiaj elementoj en la hungara kaj esperanto kaj esploras ilian etimologion. Li montras la diversajn kaj la malsamajn trajtojn kaj traktas ankaŭ la ŝanĝojn de la nomenklaturo. Temas pri laboraĵo de kompetenta fakulo.

1990: 4

STROBL Katalin (1990): Apliko de la komunika metodo en la instruado de Esperanto. 52 p. ĉe KI

La laboraĵo estas aktuala, ja dume abundas lernolibroj pri la angla kaj germana laŭ la komunika metodo, mankas tiutipaj por Eo. La verkintino unue prezentas la komunikan metodon, ĝian ekzercotipojn, la ŝanĝiĝintan rolon de instruisto, la gruplaboron ne preteratentante la psikologiajn aspektojn surbaze de vasta kono de fakliteraturo kaj de siaj propraj spertoj.

Post analizi la specialan taŭgecon de Eo por tiu ĉi metodo, ŝi skizas en la ĉefa parto esperantan lernolibron por progresantoj laŭ la komunika metodo. Ŝi prezentas la temojn (alirante ilin el praktika flanko) kaj la strukturon de la ĉapitroj. Ŝi ellaboras unu ĉapitron detale (dum 80 tagoj ĉirkaŭ la mondo): de la strukturaj ekzercoj ĝis la komunikaj ludoj. Konsiloj por instruistoj sekvas la lecionon. La laboraĵo estas bonega, ĝi malkaŝas veran pedagogon. Ni deziras, ke ŝi ekhavu la emon kaj la eblecon por ellabori la tutan lernolibron.

SIMON Margit (1990): Komparado de sintaksaj strukturoj en Esperanto kaj en la itala surbaze de tradukaĵoj de hungaraj beletraj verkoj. 56 p. ĉe KI

La laboraĵo komenciĝas per lingvotipologia aliro, poste de pli grandaj strukturaj unuoj ĝi iras al pli malgrandaj: vortordo, verbaj rekcioj, problemoj de substantiva sintagmo, pronomoj, determinantoj, negado kaj pasiva strukturo. La konstatojn ilustras ekzemploj el la 3 verkoj. Ofte la verkantino kontentiĝas pri la vicigo de lingvaj faktoj kaj ne konkludas. Estus pli feliĉe eliri ne el la itala, sed aŭ el la hungara, aŭ el la esperanta versio.

KISDÉRY Zoltán (1990): Esperanto en la sciencoj. 39 p. ĉe KI

Kvankam la temo – faka aplikado de Eo – estas aktuala kaj esplorinda, la verkinto nur citas – ofte laŭvorte, sen fontindiko – la konatajn faktojn (fakajn asociojn, konferencojn, vortarojn). Mankas memstara laboro, komparoj kaj konkludoj.

SMIDÉLIUSZ Kálmánné (1990): Kvinlingva pedagogia terminaro. V+137 p. ĉe KI

La verkintino baziĝis sur la hungara Pedagogia Leksikono, ŝi elektis la plej gravajn terminojn (575), la difinojn ŝi kompilis el pluraj fontoj. Por trovi la E-ajn terminojn ŝi trakribris plurajn pedagogiajn verkojn (i.a. multajn numerojn de IPR). La E-an kapvorton sekvas E-lingva difino, poste la tradukoj en 4 lingvoj (angla, germana, hungara kaj rusa), kio konformas al la internaciaj normoj pri terminara laboro. Estas bone, ke aperas ankaŭ kelkaj praktikaj esprimoj, derivaĵoj kun la termino. Kvankam necesus ankoraŭ iom modifi la konsiston de la terminoj – forlasi kelkajn ĝeneralajn nociojn kaj aldoni la terminojn de la moderna pedagogio –, la laboraĵo estas tre utila kaj valora. Ne havante pedagogian terminaron, estus konsilinde publikigi ĝin post internacia reviziado.

kompilis KI kaj VHZS

Doktorigaj disertaĵoj: 2

KOUTNY Ilona (1990): Gépi beszédelőállítás és alkalmazása a magyar és az eszperantó számítógépes oktatásában [Maŝina parolgenero kaj ĝia apliko en la komputila instruado de la hungara kaj Esperanto]. 70 p.
Oponentoj: prof. d-ro Ferenc Papp kaj d-ro Gábor Olaszy; kroma ekzamenanto: d-ro Balázs Wacha

La konciza laboraĵo unue prezentas la parolsintezon kadre de la MULTIVOX sistemo, ĝi traktas la fonetikajn kaj fonologiajn problemojn por la Ea versio ESPAROL kaj donas regulojn por la realigo de korekta intonacio.

La verkintino serĉas la rolon de sintezita parolo en KALL (Komputile Asistata LingvoLernado), poste ŝi skizas instruprogramojn por diversaj ekzercotipoj, kies instrumaterialon la instruistoj facile povas ŝanĝi (t.n. aŭtoraj programoj). Por ilustri, ke el tiuj eblas kunmeti instrumaterialojn por diversaj lingvoj, ŝi kunmetas la unuajn 10 lecionojn de komencaj hungara kaj esperanta kursoj.

La disertaĵo estas multflanka, bone strukturita; la temo noveca en kaj ekster E-ujo (elirante el la laboraĵo de K. Kisfaludy plivastigis la temon kaj evitis ĝiajn mallertaĵojn).

d-ro SZEMOK Balázs (1988): A fogászati szaknyelv fejlődése a magyar nyelvben és kifejlesztése az eszperantóban [La evoluo de la stomatologia fakling-vaĵo en la hungara lingvo kaj ĝia evoluigo en Esperanto]. 172 p.
Oponentoj: prof. d-ro László Grétsy, d-ino Borbála Keszler; kroma ekzamenanto: d-ino Katalin Horváth

La verkinto plenumis grandan kaj detalan laboron koncerne la stomatologian terminaron baziĝante unuavice sur hungara fakliteraturo. Aperas plurcent terminoj en la hungara kaj Eo kaj analizo de problemoj, sed sistemeco kaj selektivo ne estas fortaj trajtoj de la laboraĵo.

Recenzoj

Gerda malaperis!

Unterrichtsmaterial für Esperanto-Sprachkurse. Wortliste für den deutschen Sprachraum. *(Lernomaterialo por Eo-lingvokursoj. Vortlisto por Germanlingvujo.) Ellaboris Horst Gruner kaj Thomas Pusch. GEA-GEJ, Bonn, 1990.*

Se vi jam konis la faman lingvo-instruan romaneton "GERDA MALAPERIS!" de Claude Piron, vi povis konstati, ke ĝi estas elstare taŭga pedagogia materialo. Kombiniĝas en la teksto zorge ellaboritaj lernigaj principoj kun enhavo plezura, streĉa. Malpli konate estas, ke GERDA taŭgas ne nur kiel legolibro, sed kiel kompleta lernolibro internacie uzebla. La romaneton kompletigas aliaj libroj de la sama aŭtoro: "Lasu min paroli plu!", "Vere kaj fantazie", "Ili kaptis Elzan" (plus "Dankon, amiko!" – la red.) – rakontoj kaj romaneto por kun- kaj poststudado. Esencaj por GERDA kiel lernolibro estas la t.n. vortlistoj, kiuj listigas laŭĉapitre la novajn vortojn kaj ekzemplojn de la ĉefaj novaj gramatikaĵoj kun tradukoj nacilingvaj.

Haveblas nun vortlisto germanlingva. Krome, vortlistoj ekzistas por la lingvoj franca, nederlanda kaj onidire portugala. Angla traduko pretas, sed ne jam troviĝis eldonanto. Aĉetuntoj devas preskaŭ detektive serĉi tiujn vortlistojn: UEA ilin ne vendas kaj multaj libro-servoj ilin eĉ ne konas.

Tia stato rilate al la vortlistoj, naŭ jarojn post la ekesto de GERDA, indikas mankojn, kiuj malhelpas ĝian sukceson kiel lernolibro. Plej grava manko fakte estas, ke instruisto ne trovas helpon preparante GERDA-lecionon. Demandoj, ekzercoj, klarigoj, tabeloj, ludoj estas instruiloj eĉ de spertulo nur temporabe ellaboreblaj. Tial ekestis la ideo kolekti tian materialon por eventuala eldono. Ĉe Germana Esperanto-Junularo, la GERDA-instruilaro nun estiĝas en versio unulingva, do internacie uzebla. Unua versio fotokopiita mendeblas; instruistoj-instruontoj estas invitataj kontribui al ĝiaj ampleksigo kaj elprovo. Bona instruilaro povos inspiri pluajn vortlistojn en aliaj naciaj lingvoj (GEJ-komputilo kaj sperto helpe pretas) kaj ebligi al GERDA indan lokon inter la lernolibroj naciaj kaj internaciaj. Ĉu GERDA reaperos ĉe lernintoj diverslandaj kiel ties unua komuna Esperanto-kulturaĵo? Vi instruistoj decidos.

La vortlisto: 3 GM + sendokostoj (aŭ 3 irk-oj)
La instruilaro: 2 GM + sendokostoj (aŭ 2 irk-oj)
ĉe GEJ, Rheinweg 15, D-5300 Bonn 1.

Horst Gruner

(La vortlisto, 38 + 8-paĝa broŝuro, efektive alvenis al ni. La necesaj vortoj kaj novaj gramatikaĵoj prezentiĝas laŭ 25 ĉapitroj, 8 pluaj paĝoj indekse montras la lokon de la unua apero por la vortoj. – La red.

Diskut-dokumento por la membraro:

STATUT-PROPONO POR NIA LIGO

Tra la lastaj jaroj kaj precipe dum la estrar-elektoj en Kerkrade, evidentiĝis pluraj punktoj en nia proceduro, kie la nuna Statuto de la Ligo simple ne donas gvidon. Praktike la tutan elekto-proceduron la komisiono devis mem ellabori kaj akceptigi ĉe la Asembleo. Pro tio, la nova estraro transprenis la taskon proponi revizion de tiu dokumento.

Ĝi akceptis la proponon de s-ro Oene Hoekstra el Nederlando, tralabori la nunan Statuton kaj proponi novan version. Tion li faris kaj la Estraro kore dankas lian laboron. Ĝi traktis tiun proponon, unue poŝte kaj poste en sia februara kunsido en Budapeŝto. Poŝtajn proponojn faris nia tiama ĝenerala sekretario, s-ino Audrey Childs-Mee (ACME) tuj antaŭ la kunsido, aliajn modifojn faris la Estraro (E) al la propono de s-ro Hoekstra (OH). En la estraro, Stefan MacGill (SMG) alprenis la taskon prizorgi la pluiron, sed nur fine de majo li sukcesis dissendi al la Estraro kaj s-ro Hoekstra la netigitan rezulton de la februaraj diskutoj. Ili estis buŝe prezentitaj al konferencanoj en Hanabanilla – ne eblis disdoni al ĉiu skriban tekston kaj ĉiuokaze la komitato ne povis tie kunveni. La kunsido tie faris nur unu proponon – aldoni kategorion por dumvivaj membroj.

Bedaŭrinde, de junio ĝis nun venis neniuj pliaj reagoj, ankaŭ ne de s-ro Hoekstra, la proponinto de la traktita teksto. Do, la teksto proponita sube tre similas tion, kion la Estraro februare akceptis, kun nur kelkaj modifoj, kiuj estis demandosigne proponitaj de smg en la maja dokumento. Ni dekstre indikos ŝanĝojn kaj iliajn fontojn, kaj aldonos kelkajn pli principajn komentojn fine.

Bonvolu diskuti ĉi tiun dokumenton en viaj sekcioj, por ke viaj Asembleanoj en Voss povu esprimi viajn opiniojn kaj voĉdoni. Memoru, ke la trakto de la Statuto, kiel ankaŭ la estrar-elektoj kaj ĉio cetera, okazos laŭ la nun-valida Statuto.

La plej grava ŝanĝo en la nova Statuto, kiun subtenis ĉiu modifanto, estas la kunfandigo de la nunaj Komitato kaj Asembleo en unu organon (la Komitaton) kiu kunsidos ĉiujare. Se al iu mankas la teksto de la nuna Statuto, petu tion de nia kasisto, s-ro Bertil Andreasson. (adreso kovrile).

Postskribo: ĵus antaŭ kristnasko alvenis nova teksto-propono de s-ro Hoekstra. Vidu p. 26!

IDENTECO

Artikolo 1

La organizaĵo estas nomita 'Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj' En la plua teksto de ĉi tiu Statuto kaj de la Regularo, kiu ĝin kompletigas, ĝi estas nomita 'ILEI' aŭ 'La Ligo'.

Aldono 'La Ligo' (ACME+E); Majuskligo E kaj I (E).

Artikolo 2

2.1 ILEI estas fondita en 1949 por nelimigita tempo.

2.2 ILEI estas faka organizaĵo pri edukado kaj instruado.

2.3 ILEI estas aliĝinta al Unesko en Kategorio C ekde aŭgusto 1977, laŭ listo CPX/77/10 S.7 numero 110.

2.4 ILEI havas sian juran sidejon en la Respubliko San Marino.

2.5 ILEI estas demokrata organizaĵo, sendependa kaj memstara en rilatoj al aliaj organizaĵoj kaj institucioj.

2.6 La bazo de la laborpolitiko de ILEI estas la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj la Universala Deklaracio de la Rajtoj de la Infano.

2.7 La oficiala lingvo de ILEI estas la Internacia Lingvo, Esperanto.

2..3 ekde unuvorte kaj laŭ (smg); 2.5 rilatoj al/kun? 2.7 sen ligstreko, kun komo (ACME+E)

CELO

Artikolo 3

Edukado al estimo de la Homo kaj interkompreniĝo inter la popoloj.

Minuskligo de l. (E)

Artikolo 4

4.1 Unuigi instruistajn Esperanto-organizaĵojn en la mondo por sisteme labori por la enkonduko de Esperanto en ĉiuspecajn lernejojn.

4.2 Atenti, esplori kaj analizi pedagogiajn problemojn en la instruado kaj edukado kaj labori por solvoj de tiuj problemoj.

4.3 Iniciati kaj subteni sciencajn esplorojn pri instruado de fremdaj lingvoj.

4.4 Organizi interŝanĝojn de spertoj el la pedagogiaj scienco kaj praktikado por plibonigo kaj modernigo de la Esperanto-instruado.

4.5 Organizi diversspecajn internaciajn aranĝojn por infanoj cele al interkompreniĝo pere de la Internacia Lingvo.

4.6 Organizi pedagogiajn konferencojn kaj laborkunvenojn.

4.3 Ŝanĝita al 'iniciati'. (ACME+E) 4.5 'aranĝi' (siatempa komposteraro) 4.7 ligstreko forigita. (E). Indus rigardi la formulon de niaj celoj en nia varbilo de 1987.

4.7 Aranĝi internaciajn ekzamenojn pri la instrukapablo en la Internacia Lingvo, Esperanto.
4.8 Kontakti kun registaraj, edukaj instancoj kaj aliaj institucioj kaj kunlabori kun Esperanto-organizaĵoj.
4.9 Eldoni publikaĵojn kaj komunikaĵojn.
4.10 Apliki aliajn leĝe permesatajn rimedojn.

FINANCAJ RIMEDOJ
Artikolo 5
5.1 Membrokotizoj.
5.2 Kontribuoj de donacantoj.
5.3 Rentoj kaj heredaĵoj.
5.4 Aliaj enspezoj.

LA ORGANIZA STRUKTURO DE ILEI
Artikolo 6
La ĉefaj organoj de la Ligo estas:
6.1 La Komitato
6.2 La Estraro
6.3 La Sekcioj

Smg proponas ĉi tiun inversigon de 6 kaj 7. La alineo 'Membraro' uzas terminojn difinitajn en la alineo 'Organiza strukturo.' Aliaj reordigoj, por ne uzi nociojn nur poste difinitajn. Ekz. 6.1.6 estu post 6.1.4 kaj 6.1.5, ne antaŭ.

LA KOMITATO
6.1.1 estas la supera organo de la Ligo.
6.1.2 konsistas el la estraranoj, la delegitoj de la sekcioj kaj de la individuaj membroj.
6.1.3 fiksas la jaran membrokotizon kaj aprobas la buĝeton, bilancon kaj financan raporton.
6.1.4 elektas kaj senŝarĝigas la estraron.
6.1.5 rajtas starigi kaj malstarigi laborkomisionojn por studi difinitajn problemojn aŭ plenumi difinitajn taskojn.
6.1.6 pridiskutas la faritan laboron de la estraro kaj sekcioj kaj laborkomisionoj kaj decidas pri la sekvotaj gvidlinioj por la venonta periodo.
6.1.7 kunsidas minimume unufoje jare en la kadro de la Konferenco de ILEI.
6.1.8 decidas en kazo de apelacio kontraŭ eksmembriĝo.
6.1.9 decidas pri akcepto aŭ ŝanĝo de la Statuto kaj Regularo.
6.1.10 decidas pri la akcepto aŭ eksigo de sekcioj.
6.1.11 decidas pri la nomado de Honoraj Membroj, laŭ proceduro difinita en la regularo.

Necesas difini kvorumon!

6.1.12 decidas pri la konsisto de Kontrola Komisiono, kies taskoj estas la kontrolo de la financa stato de ILEI kaj pritrakto de apelacio kaze de eksmembrigo.
6.1.13 decidas en ĉiuj kazoj krom la subaj per simpla plimulto de la voĉoj. Se okazas voĉegaleco, la voĉo de la kunsida prezidanto decidas.
6.1.14 decidas pri ŝanĝoj de la Statuto kaj la eventuala malfondo de la Ligo. Proponoj ĉi-rilate estos akceptitaj nur se minimume du trionoj de la voĉoj estas por la propono.

Ĉu la kunsida prezidanto ne havu voĉdonrajton krom ĉe egaleco? OH kaj E ne decidis pri tio.

LA ESTRARO
6.2.1. gvidas la Ligon.
6.2.2. faras proponojn pri agadlinioj kaj deziratajprojektoj al la Komitato.
6.2.3. raportas kaj respondecas pri sia agoj al la Komitato.
6.2.4. rajtas okazigi skribajn voĉdonojn de la Komitato.
6.2.5. konsistas el nepara nombro da membroj, minimume kvin: prezidanto, ĝenerala sekretario, estrarano pri financoj, vicprezidanto kaj vicsekretario.
6.2.6 havas tri-jaran ofic-daŭron; eksiĝintaj estraranoj estas sinsekve ĝis dufoje reelekteblaj.
6.2.7 rajtas inviti gastojn al siaj kunsidoj kaj al tiuj de la Komitato.

OH proponis kvinjaran estraran mandaton kun unu reelekteblo. La E malakceptis tion.
La malnova Statuto parolis pri referendumo, sen difini ĝin – ĉu voĉdonigo de la komitato, asembleo aŭ membraro. Ĉu ni aldonu ion?

LA SEKCIOJ
6.3.1. agas en difinita teritorio.
6.3.2. respondecas pri ĉiuj siaj agoj.
6.3.3. povas esti fondataj per minimume kvin membroj.
6.3.4. pagas la kotizon ĉiujare antaŭ la 31a de marto. En kazo de nepago la komitatanoj de tiu lando perdas sian voĉdonrajton.
6.3.5 raportas skribe pri siaj agoj al la Komitato ĉiujare. La raporto atingu la ĝeneralan sekretarion minimume unu monaton antaŭ la kunsido de la Komitato.

La propono de Smg pri minimuma membraro por fondi sekcion (20) kaj tiu de OH (10) ambaŭ falis. La E restis ĉe la malnova 5.

MEMBRECO EN ILEI
Artikolo 7
7.1 Ĉiu persono kiu rekonas la Statuton, sin okupas pri edukado kaj/aŭ instruado, rajtas membriĝi.
7.2 Membroj distingiĝas: 'Sekciaj membroj' (SM), 'Individuaj membroj' (IM), Dumvivaj membroj (DM) kaj 'Honoraj Membroj' (HM).

7.1 'rajtas' (E)

7.3 Sekciaj Membroj estas aligitaj al ILEI de la sekcioj. Escepte ankaŭ la kasisto de ILEI aŭ ties delegito rajtas akcepti tiujn membriĝojn laŭ interkonsento kun la Sekcioj.

7.3 La duan frazon aldonis smg. Vidu la noton fine.

7.4 Individuaj Membroj estas individue aliĝintaj al ILEI. Tio eblas nur en teritorio sen funkcianta sekcio.

7.4 Dua frazo aldonita de OH, ACME + E)

7.5 Dumvivaj membroj pagas kotizon fiksitan en la Regularo.

7.6 Honoraj Membroj estas nomitaj surbaze de siaj meritoj por ILEI aŭ por la instruado de Esperanto, laŭ proceduro difinita en la Regularo.

KONSISTIGO DE LA KOMITATO

Artikolo 8

SMG proponas krei apartajn alineojn 8 kaj 9 por ne tro balasti 6. La koncernaj temoj estas tro gravaj por resti en la regularo.

8.1. La Komitato konsistas el la estraro kaj delegitoj de la sekcioj kaj de la individuaj membroj. Tiuj delegitoj estas nomitaj de la sekcioj laŭ la nombro de sekciaj, dumvivaj kaj honoraj membroj sur sia teritorio:

ekde 5 membroj	unu delegito
de 14 ĝ is 34 membroj	du delegitoj
de 35 ĝ is 49 membroj	tri delegitoj

kaj por ĉiu plia 50 aŭ parto de 50, unu delegito pli.

La proporcio membro/delegito estas akceptita de la E: malnova estis 5,15,45; OH proponis 10,30,50.

Komence de ĉiu sesio (kunven-serio) de la Komitato, la ĉeestantaj individuaj membroj (plus honoraj kaj dumvivaj membroj loĝantaj en teritorioj sen funkcianta sekcio) kunvenas kaj elektas sia(j)n delegito(j)n laŭ la supra proporcio.

8.2. Ĉiu Komitatano devas esti aktuala membro de la Ligo.

8.3. Nur komitatanoj (delegitoj kaj estraranoj) havas voĉdonrajton. La kunsida prezidanto sindetenas, krom en kazo de voĉegaleco. Neniu rajtas je pli ol unu voĉo.

Ĉi tiuj lastaj punktoj estas reverkitaj de smg laŭ estraraj diskutoj. Ili plejparte sekvas la spiriton de la propono OH, krom en unu grava punkto, kiun la estraro ne povis akcepti. ~~Vidu la noton fine.~~

8.4 Ĉiu membro rajtas ĉeesti komitatkunsidojn kun parolrajto, sed komitatanoj ricevas prioritaton tiurilate. Nemembroj rajtas ĉeesti laŭ estrara invito, sed paroli nur post konsento de la kunveno.

KONSISTIGO DE LA ESTRARO

Artikolo 9

9.1. Okaze la estrarelekto, la Komitaton prezidas ne-kandidato.

9.2. La Komitato unue decidas pri la nombro de estraranoj kaj nomas voĉkalkulan komisionon.

Sed la dua projekto de OH retiras tiun proponon.

9.3. La voĉdonoj estas skribaj kaj sekretaj, sed en kazo de ununura kandidato la Komitato rajtas decidi elekti aŭ reelekti per manlevo.

9.4. Rajtas proponi kandidatojn la estraro, sekcioj kaj kandidatiga komisiono (se la Komitato tion nomis), prefere anticipe, sed ankaŭ dum la kunsido mem.

9.5. La prezidanto estas aparte kaj laŭofice elektita unue. La ceteraj estraranoj estas tuj poste bloke kaj senofice elektitaj. La Estraro decidas pri la cetera taskdivido mem.

9.6. En kazo de intertempa eksiĝo de estrarano, la prezidanto respondecas pri la daŭrigo de ties laboro, kaj rajtas starigi voĉdonon, ĉu skriban ĉu ĉeestan, por nomi novan estraranon.

PUBLIKAĴOJ

Artikolo 10

10.1 La oficiala organo de ILEI nomiĝas 'Internacia Pedagogia Revuo' (IPR)

10.2 IPR aperas minimume trifoje jare.

10.3 La redaktoro de IPR estas nomita kaj se necese malnomita de la Estraro.

ĈESO DE MEMBRECO

Artikolo 11

Supozeble la malnova statuto pensis pri eksigo kaj eksiĝo de individuoj, ne sekcioj. Ni enkondukas la nocion 'forfalo de membreco'. Okaze de kotizopago, la membreco 'malforfalas'.

11.1 Eksmembriĝo okazas per skriba sciigo de la sekcio aŭ de la membro al la ĝenerala sekretario.

11.2 Forfalas la membreco se la kotizo por la kuranta jaro ne estas pagita ĝis la 31a de marto en tiu jaro.

11.3 Eksmembrigo okazas pro kontraŭstatuta agado, laŭ decido de la estraro, skribe komunikata al la koncernato kaj ties sekciestro. Apelacion kontraŭ tiu eksigo traktas la kontrolkomisiono kaj pri ĝi fine decidas la Komitato. Eksigo ekvalidas du monatojn post la skriba komuniko, se ne venis skriba apelacio. Kaze de apelacio, la membreco restas netuŝita ĝis la Komitata decido.

EKVALIDO

Artikolo 12

12.1 Ĉi tiu Statuto ekvalidas tuj ekde la fino de la sesio en kiu ĝi estis akceptita. Modifoj al ĝi simile ekvalidas. Akcepto aŭ modifoj al ĝia akompana regularo simile ekvalidas.

Du proponoj: La paĝojn 20 ĝis 26 ni kompostis kaj enpaĝigis fine de novembro, laŭ la supozo, ke reagoj ne plu venos. Sed tuj antaŭ kristnasko, kiam ni estis en finredakta fazo, ni ricevis de s-ro Hoekstra novan projekton de statuto kaj regularo. La buĝeto de IPR ne permesas al ni forĵeti tiom da farita kaj pagita laboro, do ni aperigas paĝojn 20 ĝis 25 senŝanĝe kaj reverkas nur ĉi tiun. Legantoj do konsciu, ke ĉi tiu teksto estas nur unu el du eblaj proponoj.

La estraro estas nun studanta la novan proponon; tra la novjaraj tagoj mi faros skriban analizon por la estraro kaj s-ro Hoekstra, kiun ni invitas al la februara estrarkunsido. Tie ni provos decidi, kiun version plupoluri. Kiu ajn el la du, la ekzisto de la alia utilas, ĉar ĝi proponas alternativojn kaj devigas nin trapensi la eblecojn kaj efikojn pli zorge.

Pezo de la Statuto: La nuna statuto kaj regularo havas la saman pezon, t.e. la proceduro ŝanĝi ambaŭ samas. Ambaŭ proponoj de s-ro Hoekstra retenis tion, kvankam lia nova propono mallongigas la statuton kaj metas multon en la regularon. Prave, ĉar pluraj punktoj en la nuna statuto estas tro efemeraj aŭ negravaj kaj prefere transiru al la regularo (ekz. la detala task-divido de estraranoj), dum aliaj tute esencaj punktoj troviĝas ĉu en la regularo, ĉu mankas entute. SMG preferas diferencon inter la du — ŝtatut-ŝanĝo postulu anticipan skriban proponon kaj dutrionan plimulton en ĉeesta kvoruma sesio de la komitato; regular-ŝanĝo postulu simplan plimulton en kvoruma voĉdono, ĉu ĉeesta, ĉu poŝta. Ĉiu propono ĝis nun forgesis difini kvorumon. Normale duono.

6. Membraro: La proponoj de s-ro Hoekstra volas insisti, ke ĉiu loĝanto en lando kun sekcio aliĝu nur tra ĝi. La Estraro subtenas tiun principon, sed ĝi, kaj SMG aparte, ne volas cedi la rajton de la kasisto de ILEI aŭ ties delegito akcpeti kotizojn rekte de tiuj personoj. Estus tro absurde, ke la liga kasisto devu rifuzi aliĝemajn personojn, ekz. en la ILEI-konferenco mem. La kasisto devos scii la enlandajn kotizojn de la sekcioj por povi peti kotizon, kiu inkluzivu parton por ILEI kaj parton, kiun ILEI transigu al la sekcio. Alia solvo estus fiksi kotizon ekz. duoble de la nuna (100skr.) el kiu ILEI retenas la duonon kaj sendas/kreditas 50 skr. al la sekcio. En tiu spritio SMG modifis punkton 6.3.

8. Konsisto de la komitato: Pri la rilato inter la nombro de sekciaj membroj kaj komitatanoj, la kvar proponoj signife malsamas, do mi jam pretigis laŭlandan analizon pri tio, unue (**A**) por la nuno (ĉ. 750 membroj en 30 sekcioj) kaj due (**B**) por optimisma estonto kun ĉ. mil membroj en 35 sekcioj. La unuaj kolumnoj montras kiom da membroj necesas por 1, 2, 3, kaj pliaj komitatanoj.

Propono	1kom. ekde	2kom. ekde	3kom. ekde	4kom. ekde	5	6.	7.	8.	Nun: A	Onte?: B
Nuna statuto	5	6	16	46	61	76	91	106	70-75	ĉ.100
Hoekstra 1	10	11	31	51	101	151	201	251	ĉ. 50	70-75
Hoekstra 2	5	5	11	26	41	56	71	86	90-95	ĉ. 120
Estraro	5	15	35	50	100	150	200	250	ĉ. 60	75-80

UEA havas ĉ. 95 komitatanojn por 44,000 anoj: ĉu ILEI bezonas same por 750 membroj? Kun pli ol 80 rajtigitaj komitatanoj, ni riskus ne povi atingi kvorumon, eĉ en eŭropae konferenco, eĉ en elektojaro.

smg, 29 dec 1990

• Estrarkunsido: Tion gastigos la prezidanto de la 22a ĝis la 24a de februaro 1991 en Kalmthout, Belgio. Kiu volas fari proponon, komenton, plendon, oferti sian kunlaboremon, bv. skribi al la prezidanto (adreso sur la kovrilo) ĝis tiam.

• Regularo Supera Ekzameno: Tion ni aperigis en IPR 90/3 (la antaŭa). Nun viaj sekciestroj (komitatanoj) ricevas voĉdonilon, kies limdato estas tuj antaŭ tiu kunsido. Se vi havas demandojn, komentojn, dubojn aŭ proponojn, bv. sekvi la alvokon jam faritan kaj kontakti vian sekciestron, por ke ties voĉdono spegulu vian opinion.

• Statuto: Viaj reagoj al la Statut-propono en ĉi tiu numero estas bonvenaj ĝis tiu dato, se la gazeto atingos vin ĝustatempe por permesi tion. Sed pri la statuto la debato daŭros almenaŭ ĝis Voss.

ILEI labortable

• Konferenco: Aliĝiloj aperis en la antaŭa numero, se vi bezonas pli bv. peti de Malcolm Jones (adreso kovrile). Sekciestroj rajtas peti kvanton por sia sekcio. Artikolo pri la kadra temo aperas ĉi-numere. Voss situas en rave bela parto de Norvegio, nepre ne maltrafu nian jubilean konferencon — konvinku ankaŭ kolegojn aliĝi!

• Faka temo por la konferenco: Ni anoncis larĝan temon por la nuna jubilea konferenco, sed ni ne volas forpeli tiujn, kiuj preferas prezenti aŭ aŭskulti fakajn prelegojn. Do, ni anoncas paralelan fakan temon: "Konsciigo de la lingva problemo en la mondo pere de Esperanto-instruado."

• Vidbendo: Atingis nin dua raporto pri tiu projekto de lanĉita de IEI (v. IPR 90/3, p. 21). Konkretajn paŝojn aŭ alvokojn, ni anoncos en estontaj numeroj.

• Pedagogia Kurso: Tiu kurso ne povis okazi en 1990 pro nesufiĉaj aliĝoj. KCE ne povas akcepti ĝin en 1991 pro neeviteblaj reorganizaj laboroj, sed KCE kaj ILEI ambaŭ esperas restarigi ĝin tie en estontaj jaroj. En 1991 ILEI diskutas kun la gvidantino, mag. Irena Szanser kaj la Bialistoka Esperanto-Centro pri okazigo de la kurso tie fine de aŭgusto aŭ komence de septembro. Tio malfermos la kurson al multaj, kiuj ne povus ĝin sekvi en Svislando. Ne maltrafu la okazon! Detaloj sekvos.

• Lingvo-ekzamenoj: En julio okazis sesio de niaj internaciaj ekzamenoj unuafoje en Jugoslavio. Ni aperigos jaran protokolon en la venonta IPR, kiu inkluzivos rezulton de sesio espereble okazigota en Lomé, Togolando, kadre de la Unua Afrika Kongreseto.

• IPR 91/1: Ankaŭ en tiu numero ni aperigos indekson de la fakaj kaj pli gravaj artikoloj aperintaj en IPR tra la jardeko kies fermon markas ĉi tiu numero; 1980 — 1990. Atendu tie ankaŭ la rekomendatan lego-liston por niaj ekzamenoj, kaj imponan liston de klerigaj kaj pedagogiaj vidbenditaj prelegoj akirebla de Sarlanda Esperanto-Ligo, kies tekstoj ne trafis niajn labortablojn ĝustatempe por eniri la nunan ja plenŝtopitan numeron.

• Statistikado: Ni ne aperigis enketilon pri la instruado ĉi-jare, ĉar ĝia prilaboro postulas tro da laborfortoj. Venontjare eble. Sed instruisto, kiu volas anonci sin, sian klason, peti klasan aŭ individuan korespondadon aŭ alispecan internacian kontakton, neniel hezitu skribi al ni. IPR estu pedagogia afiŝtabulo kaj bazaro! Ankaŭ Juna amiko akceptas senpage korespond-petojn de infanoj kaj instruistoj.

• Juna amiko: Tio ne ĉesis aperi! Nur ĝia kvara numero ŝtopiĝis en la presejo pro kristnaskaj premlaboroj ktp. Kvankam prespretigita mez-novembre, nur januare la presejo ĝin liveros. Ni efektive perdis oficialajn abonoblojn por du trionoj de niaj legantoj, sed alternativa reto de perantoj estas konstruata en tiuj landoj — kontaktu viajn landajn sekciojn aŭ HEA por scii, kiuj estos perantoj. En okcidento, ĉio trankvila; abonojn akceptas UEA je 10 guldenoj, ankaŭ dudeko da aliaj perantoj nacivalutaj. Novaj perantoj aktivas en Argentino, Hispanio, Japanio, Rumanio. Abonu nun, helpu nin travivi!

• Bondeziroj: Jam malfruas sendi kristnaskajn bondezirojn, sed nome de la redakcio de IPR kaj de la estraro de ILEI, ni kore dankas la membrojn, legantojn, kontribuintojn, kunlaborantojn, sekciestrojn pro sia agado tra 1990 kaj disradias ileiajn, iprajn kaj neprajn bondezirojn por la nova jaro kaj jardeko.

smg, 26 dec 1990.

Pri verkadaj principoj por la Lernolibro de Esperanto en Sciencoj kaj Teknikoj*

SHAO Rong (Soliva)

*Ni uzu la mallongigon **LEST** en ĉi tiu artikolo por la libro pritemata.

1. Enkonduko

Temas ĉi tie pri la lernolibro de Esperanto kiel unu el la duaj fremdlingvoj, servanta por la nedeviga studobjekto por studentoj de fakoj scienc-teknikaj. Tial la libro devas antaŭ ĉio obei gravajn principojn de universitata instruado. Esperanto estas bona artefarita lingvo; kaj la nedeviga kurso de Esperanto kiel dua fremdlingvo posedas siajn proprajĵojn kompare kun la deviga kurso de la unua fremdlingvo kaj eĉ kun la nedeviga de la ceteraj duaj fremdlingvoj [1]. Tial la libro devas due dependi de la proprajĵoj. Kaj fine LEST devas iuaspekte diferenci de la lernolibro de Esperanto por ĝenerala uzo aŭ por studentoj ne-sciencteknikaj. En aplikado de ĉi tiuj principoj sufiĉe pripensendas la situacioj priparolitaj en [1] kaj vidpunktoj, tial ĉi tiu artikolo estas la dua el la serio pri la esplorado de universitata Esperanto-instruado. La aŭtoro de ĉi tiu artikolo verkis serion da du lernolibroj [2 kaj 3]. Oni povas trovi en ili multajn ekzemplojn por apliki la principojn kaj metodojn pritraktatajn ĉi tie.

2. Ĝeneralaj principoj por universitata instruado

2.1. Principo por substrekado de la bazo. Ĉiu studobjekto havas siajn fundamentojn, kiujn la studentoj devas posedi, kaj nur surbaze de kiuj eblas por ili studi lerte. La lernolibro de Esperanto devas enhavi en si nur la fundamentan gramatikon kaj bazajn radikojn. La Akademio de Esperanto publikigis la Bazan Radiakaron Oficialan (mallongigo: B.R.O.) Oni subdividis ilin en 9 grupojn laŭ la statistiko de ofteco [4]. La unuaj 6 grupoj, estante la plej oftaj, nombras 941 radikojn. Ni devas en la lernolibro laŭeble elekti radikojn el inter ili. Por fari la bazon firma, ne imitindas tiuj lernolibroj de duaj fremdlingvoj por st- (mallongigo de „scienc-tekniko") fakoj, kiuj dekomence renkontas la st-on. La libro devas subdividiĝi en du partojn: la unua provizu bazajn radikojn kaj fundamentajn regulojn gramatikajn, ke oni povu en la dua kontakti la st-on. La nedeviga Esperanto-kurso klerigas ĉefe la kapablon legan kaj iom tiun por la simpla skribaĵo. Por la aŭskulto kaj parolo eblas nur la postulo pri la plej fundamenta, simpla interparolo ordinara. Tial en la libro ĉi tiuj devas speguliĝi responde. Ĉar en la izolita kaj fermita cirkonstanco lingva ĉirkaŭ ni, estas tre malfacile klerigi ĉi tiujn kapablojn, la demanda-responda frazo devas ripetiĝi multfoje.

2.2. Principo por elstarigo de la ĉefaĵo. La gramatikaj reguloj de Esperanto, kiuj mankas al la unua fremdlingvo, estas malfacilaĵoj kaj tial ĉefaĵoj por la lerno. La reguleco kaj elasteco de vortfarado estas proprajĵoj de Esperanto, fundamentoj por posedi Esperanton kaj ankaŭ malfaciloj kaj ĉefaĵoj por lerni ĝin, tial la vortfarado devas trairi tra la libro de la komenco ĝis la fino.

2.3. Principo por rafino. El la vidpunkto de instruado, sen tiu principo ne estus la elstarigo de la ĉefaĵo. Ĝi gravas precipe por la nedeviga Esperanto-kurso. La sperto pruvis, ke konvenas meznombre 25–30 novaj vortoj en ĉiu leciono kaj kreskas de malmulto al plimulto. Kvankam la novaj vortoj en ĉiu leciono kaj sciencteknikoj, samas aŭ similas al tiuj de la angla kaj rusa lingvoj, la studentoj de fakoj sciencteknikaj povas tamen esti ŝarĝataj nur de tiom. La teksto devas konveni laŭ longeco, kaj la ĉefaj gramatikaj reguloj en ĉiu leciono devas limiĝi nombre inter 2–3.

Nepras montri, ke por disponi bone la rilatojn inter la kvanto de la nova vorto en ĉiu leciono, la longo de ĉiu teksto, la ĉefaĵoj kaj sistemeco de la gramatiko, nepras plenatente apliki la principojn por rafino kaj por elstarigo de la ĉefaĵo. Pro tio oni kelkfoje devas forlasi priskribindajn enhavojn. La aŭtoro sentas, ke multe pli malfacile estas verki bonan lernolibron de lingvo en sciencteknikoj ol tiun de scienco aŭ tekniko.

2.4. Principo por intereso. Ĝi gravas precipe por la Esperanto-kurso (vidu [1]). Por instigi la studentojn lernadi, plej gravas sentigi al ili, ke lerni Esperanton estus ja en la nuna tempo utile por ili. Tial la teksto devas kompakte ligi ilian praktikon de vivo kaj la sciencteknikon. La enhavo por la lasta devas esti populara, kaj evitendas ripeti tiujn en la elementa kaj meza lernejoj. Plej bone estus priskribi la modernan scienctekinikon, kiu envenos en la ordinaran vivon el la vidpunkto de evolua tendenco. Kaj plie, avantaĝo de Esperanto estas akceli la lernadon de eŭrop-amerikaj lingvoj. Tial oni konscie plifortigu tion en la libro. Ankaŭ tio estas ekzemplo pri la apliko de la principo porinteresa.

2.5. Principo pri komparo. Ajna esplorado scienca ne povas deiĝi de ĉi tiu. Ĝi estas grava principo por konado kaj ankaŭ por instruado (vidu [5]). En la instruado de fremdlingvoj konsilindas adopti la metodon de kompara lingviko: kompari la unuan fremdan lingvon kun la ĉina kaj la duan laŭeble kun la unua tiel, ke la lernadoj de la du lingvoj antaŭenpuŝu unu la alian. Tial ankaŭ tio servas kiel ekzemplo de la apliko de la principo porinteresa. La apliko de la principo pri komparo povas ne nur plialtigi la lernan efikon de la studobjekto, sed klerigi la studentojn memkonscie apliki ĉi tiun gravan pensmetodon.

2.6. Principo pri etapeco de konado. Ankaŭ ĝi estas grava principo por konado kaj instruado [6]. Unu el ĝiaj aspektoj estas la proceso de facilo al malfacilo kaj antaŭenirado paŝo-post-paŝa. Esperanto estas lingvo kun ŝanĝo en vortformoj. Tial oni devas antaŭ ĉio lerni ĉefe la vortformikon (morfologion); absolute evitindas aperigi samtempe la komplikan kompleksan frazon en la unua parto (kiel difinita en 2.2.). Multaj malfacilaĵoj gramatikaj, kiaj la akordo de la nombro, la uzoj de la finaĵo -n kaj la kronvorto (artikolo) ktp. devas disvolviĝi laŭetape, por ke la studentoj kompletigu sian konadon paŝo post paŝo.

Kompreneble evitendas koncerni en la nuna etapo de la libro la gramatikon sur pli alta tavolo.

3. La proprajoj de Esperanto kaj Esperanto-kurso

La reguleco de gramatiko kaj la reguleco kaj elasteco de vortfarado estas du proprajoj kaj avantaĝoj de Esperanto. Apenaŭ oni posedas ilin, oni povas skribi gravajn frazojn kaj eĉ artikolojn tiel, kiel oni ligas perlojn per fadenoj. Pro determineco de la taskoj de la nedeviga Esperanto-kurso [1], la sekvantaj du problemoj meritas specialan atenton por la kurso kaj lernolibro.

3.1. Substrekado de gramatiko. La libro devas sur la responda nivelo pritrakti komplete la fundamentan gramatikon. Adopti ĉefe interparolan stilon, la didaktikojn situacian kaj de Cseh, ktp. por verki la libron, ne konvenas por la peze ŝarĝita studentaro de fakoj sciencteknikaj kaj la nedeviga kurso de pli malmultaj studhoroj. Sed tio ne ekskluzivas, ke la lekcianto sorbu iliajn avantaĝojn modere en organizo de la leciono. Ligante la tekston, la gramatiko devas esti klarigita detale kaj sekvi la principon por disiĝo kaj koncentriĝo. Tial plej bonus aldoni indekson de la gramatika sistemo, apendicojn pri la ligvortoj (konjunkcio kaj subjunkcio), antaŭmetoj (prepozicioj) kaj alfiksoj (afiksoj) por ĉiama konsulto. Konsilindas dediĉi sufiĉan atenton al la firma adaptiĝo de vortoj en grupo, kion preterrigardis multaj lernolibroj de Esperanto

3.2. Sufiĉa disvolvado de la avantaĝo de vortfarado. Vortfarado estas tute nova tasko por la studentoj pro tio, ke ili ĝin ne renkontis antaŭe en la lerno de aliaj fremdlingvoj. Tio bezonas adaptiĝadon en psiko kaj konado. Por elemente scipovi analizadon kaj faradon de novaj vortoj, necesas longdaŭra ekzercado. Tial trairigendas tiu ĉi principo de kapo ĝis piedoj. Pri la konsisto de kunmetitaj vortoj kaj derivajoj ripetendas analizo de vortelemento, kaj farindas ebla indukto pri reguleco de la deriva senco de antaŭmetoj (prepozicioj), uzataj kiel alfiksoj (afiksoj), kiaj *pri, el* ktp. La ekzercaro en ĉiu leciono devas enhavi analizadon pri konsisto de vortoj (en formo de ĉinigo el Esperanto) kaj vortfarado de novaj vortoj (en formo de esperantigo el la ĉina); la kvanto de la antaŭa povas plii ol tiuj, kiujn la studentoj povas plenumi. Por tiuj, ne solvitaj de ili mem, ili povas konsulti en la ŝlosilo por plivastigi sian vidon kaj penson.

Ni elmetas ĉi tiun principon ankaŭ por konigi al la studentoj, ke ĝi estas grava fundamento de Esperanto, kaj ke ili apliku ĝin en la estonta praktiko por eviti la atencon de „eŭropismo"** kaj fine gardi facillerneblecon de la lingvo.

** Ĝi indikas la tendencon de grandnombra enkonduko de novvortoj (neologismoj) el la ĉefaj eŭropaj lingvoj, kiun oni kutime nomas „naturalismo". Rezulte el tio ĉiam pli multiĝas eŭropismo, kaj la vortaro nenecese dikiĝas pli kaj pli. Tial ni sentas, ke pli konvenus nomi ĝin „eŭropismo" por montri ĝian esencon.

4. Specialaj problemoj de LEST

Tie ĉi temas ĉefe pri du kategorioj de la gramatiko kaj vorto.

4.1. Ĉar malmulte aŭ eĉ tute ne renkonteblaj en la artikoloj sciencteknikaj, ne aperigendas iuj gramatikaj fenomenoj kaj alfiksoj (afiksoj). Ekzemple, la kompleksaj formoj de us- kaj u-modo kaj ties pli komplikaj uzoj krom la fundamentaj; la aktivaj kompleksaj tempoj de la indika modo de la i-vorto (verbo) povas fine de la libro enkondukiĝi sen parolo pri ilia uzo; la uzo de la pasiva voĉo ne tiel substrekendas, kiel en la libro por la fakoj lingvo-literaturaj; alfiksoj (afiksoj), kiaj *bo-, -cj-, -nj-* ks. listig- kaj klarigendas nur en apendico por konsulto, ktp.; la detalo postrestas en la programo.

4.2. La fakvorto sciencteknika estas problemo komplika, kaj oni devas esti plenatenta, uzante ilin en LEST. Ĝenerale, la etnaj fakvortoj unue kreiĝas aŭ enkondukiĝas el alia lingvo fare de la aŭtoro de la artikolo kaj vaste uziĝas, poste eniras en la vortaron kaj fakvortaron, kaj fine normiĝas. Sed eĉ la vortaro kaj fakvortaro enhavas en si ne malmulte da nenormigitaj. Kompare kun tio, por Esperanto estas malsamo, ke en la Esperantaj vortaroj kaj fakvortaroj troviĝas ankaŭ fakaj vortoj, proponitaj de la kompilintoj mem, krom aperintaj. Tre malmulte da Esperantaj fakvortoj estas aprobitaj en B.R.O. Neniu sciencteknika alfikso (afikso) en la aŭtoritata PIV estas oficiala, nome nenormigita. Pro tio, ke la sciencteknika literaturo ne vaste legiĝas pro diversaj kaŭzoj, aŭ ke iuj aŭtoroj havas malsamajn kriteriojn por la normigo de la fakvorto, tial inter Esperantaj fakvortoj sin trovas multaj samsencajoj (sinonimoj) en malsamaj formoj, kaj eĉ esprimoj, ĝis nun ne atingantaj konkludojn tra longdaŭra disputo. Unu ekzemplo estas, ke komputilo, komputoro kaj komputero respondas al la sama aparato. Eĉ rilate al iuj oficialaj sciencteknikaj radikoj troviĝas kritikoj.

4.3. Resume, la Esperantaj fakvortoj sciencteknikaj povas subdividiĝi en 3 kategoriojn kiel sube. Ni opinias, ke por eviti ĥaoson, ni disponu pri ili laŭ malsamaj statoj:

4.3.1. Ni uzu laŭeble la oficialajn radikojn. Alie, uzante la proponojn, kiujn ni preferas, ni listigu aparte ilin kun la respondaj oficialaj radikoj.

4.3.2. Ne-oficialaj radikoj uzeblas. Se ekzistas pli taŭgaj, ni aranĝu jene okaze de:

4.3.2.1. la radiko, troviĝanta en PIV kaj ĝia Suplemento [8], eldonita en 1987, aŭ en Esperanto-Ĉina Vortaro [9], ni notu nian proponon en krampoj post la radiko.

4.3.2.2. la radiko, aperinta aliloke, sed ne en la supre menciitaj vortaroj, ni metu ĝin en krampoj post nia propono propra.

4.3.3. Por konceptoj, ankoraŭ sen nomoj aŭ kun nomoj, kiujn ni ne konas, uzinte niajn proprajn proponojn, ni aparte listigu kaj difinu ilin aŭ traduku per etna lingvo.

Ĉiun propran proponon ni montru per sama signo. Fine ni emfazu, ke pripensante niajn proponojn, ni plej bone atentu la fundamenton de Esperanto.

Literaturo

[1] SHAO Rong (Soliva): „Pri ecoj kaj taskoj de la nedeviga Esperanto-kurso por UIST (UIST = mallongigo de la 'Universitatoj kaj Institutoj de Scienco kaj Tekniko')" (ĉinlingve), la kvaronjara revuo de la universitato DLGD Esplorado pri supera edukado, 1988/1. p. 38–40, 53. La mallongigita traduko en Esperanto aperis en la organo de DEA La stelo de Espero 1988/4. p. 1–5.
[2] SHAO Rong (Soliva): „Esperanto", Eldonejo de DGX, 1986.
[3] SHAO Rong (Soliva): „Lernolibro de Esperanto en sciencoj kaj teknikoj (daŭrigo de ‚Esperanto')", mimeografita de la instituto DGX, 1986. Finreviziota en 1988.
[4] „La naŭ ofteco-grupoj de B.R.O.", en Aktoj de 1968–1974 fare de Akademio de Esperanto, p. 38–54.
[5] SHAO Rong: „Aplikado de la principo pri komparo en instruado" (ĉinlingve), la revuo de la instituto DGX Instruado kaj esplorado, 1982/3. p. 75–76.
[6] SHAO Rong: „La rilato inter etapeco de konada evoluo kaj la enhavo de studobjekto" (ĉinlingve), en la ĉilasta revuo, 1982/2. p. 20–22.
[7] Plena Ilustrita Vortaro (PIV), SAT, Paris, 1970.
[8] PIV kun Suplemento, SAT, 1987.
[9] Honfan (ĉefred.): Esperanto-Ĉina vortaro, Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1987.

Rimarko: La artikolo estis verkita en 1987 omaĝe al la jubilea jaro kaj reviziita en 1988; la ĉina versio aperis en *Esplorado pri supera edukado*, 1988/3.

Kuritibo 90

Interlanda seminario

Riĉenhava, altkvalita, bonorganizita. Jen kelkaj adjektivoj por kvalifiki ĉi tiun seminarion, kiu okazis de la 12a ĝis la 14a de oktobro en la urbo Kuritibo (Brazilo), ĉe la sidejo de PEA (Paranaa Esperanto-Asocio) sub ties aŭspicio kaj organizado, krom tiuj de AEA (Argentina Esperanto-Asocio).

La temo de la seminario estis: *La baza kurso*.

Geraldo Mattos malfermis la prelegojn, pritraktante la rektan metodon. Belstile li prezentis al sia aŭskultantaro la difinon kaj la bazojn de ĉi tiu instrua sistemo.

Pri didaktikaj ludoj parolis la juna argentinano, Francisco L. Veuthej. Li lernigis multajn ludojn; ĉiuj partoprenantoj bonhumore ludis, kaj ĉe ĉiu nova ludo la preleganto montris ĝiajn celojn, ekzekutmanierojn kaj karakterojn.

La kompetenta argentina instruisto, Atiljo O. Rojas prezentis la Cseh-metodan kurson.

Sinjorinoj Cláudia H.P. Amendola kaj Denise Vaz Bruno mirigis la publikon per siaj belegaj materialoj por instrui Esperanton al infanoj.

Sinjorino Elvira Fontes prelegis pri la ekzamenoj de ILEI; ŝi prezentis la postulojn de la ekzameno, kiuj estas cetere tre severaj, kaj petis sugestojn, kritikojn pri ĝi.

Alloga okazaĵo estis la teatra prezentado de *La servorajto*. Profesoro Geraldo Mattos verkis la teatraĵon, li mem reĝisoris ĝin kaj komponis la fonan muzikon.

La partoprenantoj decidis, ke la venonta kongreso, okazonta en oktobro 1991, devas realiĝi en Argentino, pri temo ankoraŭ ne difinita, sed tre eble iom simila al tiu de Kuritibo.

Fernando Carlos de Araujo

Kadrotemo de la 25a ILEI-konferenco

"Tireso, Rauma kaj nun...?"

Strategioj kaj principoj por la instruado kaj antaŭenigo de la Internacia Lingvo

Antaŭ dudek jaroj en sveda urbeto najbare al Stokolmo la junulara kongreso kreis dokumenton, kiu signife diverĝis de la akceptitaj ideoj pri la rolo de Esperanto kaj la strategio ĝin disvastigi. Se ni devus resumi tiun deklaracion en unu vorto, tio estus "engaĝismo". Konforme al tio, la kongresanoj portis ŝildojn kaj protestis surstrate pri lingva malegaleco. UEA havis tiutempe sian propran specon de engaĝismo, nome la "Uneskismo". Tiuj havis komune la deziron ŝiri la "verdan kurtenon", malantaŭ kiuj la esperantistoj ŝirmis sin, sed la malkomuneco estis la "desuprismo" neeviteble ligita kun Uneskumado, kaj la desubismo celata de la junaj kongresanoj. Ili fakte spegulis la vastan tiutempan junularan generacion, pledante por aktiva uzo de Esperanto kaj engaĝiĝo de esperantistoj en agadoj kaj movadoj kontraŭmilitaj, ekologiaj, kontraŭ malsato, anafabeteco, kaj diskriminacioj ĉiuspecaj, ne nur lingvaj. Tia aktivigo de la junularo ĝenerale velkis fine de la sepdekoj, paralele okazis inter la esperantistoj. La aplikado de tiu spirito en TEJO, precipe en ĝia Komisiono por Eksteraj Rilatoj, instituciigis ĝin kaj same neeviteble donis al ĝi pli kaj pli despuran karakteron. Ĝis la fino de la sepdekoj KER ĉesis aktivi, ĝiaj spuroj de tempo al tempo resurfaciĝas en TEJO en la formo de seminarioj pri sociaj demandoj, ofte organizataj kunlabore kun la Eŭropa Junulara Centro.

La deklaracio havas mesaĝon por la movado kaj por ILEI ankoraŭ nun. Je nia granda kosto, ni izolos nin en niajn proprajn aferojn. Ni ne devigu al ĉiu nia membro iĝi tuj socie, politike, idealisme aktiva, kelkaj el ni plej kompetentas kaj komfortas en la internaj aferoj, kiuj ja bezonas flegon. Sed inter ni estas tiuj, kiuj emas kaj kapablas aktivi en fakaj aŭ sociaj medioj, kaj tie uzi aŭ prezenti Esperanton. Tiuj ĝuu nian subtenon kaj respekton. Konkrete en ILEI, nia ekstera tereno estas la edukaj medioj – elektu ni libere ĉu desupre ĉe edukministerioj kaj Unesko, ĉu desube en lokaj lernejoj, ĉu tradicie, ĉu progresige, ĉu radikale. Ĉiuspecaj edukaj medioj kaj iniciatoj troveblas, kaj ĉiuj povas iumaniere prosperi por injekto de tia internaciismo, kian povus porti nia lingvo. La eksteraj rilatoj estas ĝuste la forta tereno de nia prezidanto, kiu mem cirkulis multajn jarojn en precize la rondoj, kiujn ni volus kontakti kaj influi, kaj povas tion fari, kiel neniu eksterulo sukcesus. De jaroj ni havas planon pri transnacia samtempa aliro de edukaj instancoj, sed ni ne havas la reton de aktivaj kunlaborantoj necesaj por transformi lian planon en realon. Ĉu eble la mesaĝo de Tireso ne sufiĉe forte vokas nin?

En 1980, kiam la dekjaraĝa eĥo de Tireso jam malfortiĝis, la junulara kongreso en la finna urbo Rauma akceptis duan dokumenton, prezentitan al ĝi de la animantoj de Literatura Foiro. Ĝin ni ne povas resumi unuvorte, ĉar ĝi estis kolekto de pluraj diversgravaj kaj diverstemaj konstatoj kaj postuloj; el tiuj tamen elstaras du: rezigno pri praceloj kaj la kreo de propraj kulturaj valoroj. La ĉefa pracelo pri kiu ni rezignu estas la kredo kaj alcelado, ke Esperanto iĝu dua lingvo por ĉiu; ni anstataŭe dediĉu energion al aplikado de la lingvo sur la kultura kampo por krei ion valoran kaj originalan. Do, kontraŭ la desuprismo, kaj engaĝismo nur sur tre limigita kampo. La unuopaj punktoj de la Manifesto bezonas pli detalan trakton ol ni povas nun doni – sed eble en estonta numero ni povos plonĝi en tiun maron. Neniu kontraŭas evidente la kreon de kulturaj kaj etikaj valoroj; la Manifesto eĉ reeĥas en tio la noblan revon de Privat kaj Hodler, ke la esperantstaro formu iun intelektan, idealisman, kulturan eliton aŭ avangardon, kiu stafetu la vojon al la cetera homaro. Denove, bela plano, sed kie la leĝioj ĝin plenumi? Por pravigi la Manifeston, ni devus povi enlupeigi la jardekon de la okdekoj kaj konstati, ke ĝi kulture elstaras pli ol la antaŭaj jardekoj. ...Nu.

Instruistoj ligiĝas ankaŭ al la elformiĝo de kulturo; dum la instruado, lernantoj devas malkovri la kulturan heredaĵon kaj literaturajn latentaĵojn de la lingvo. Necesas kuraĝigi kreivan aliron al ĝi kaj respekton por ĝia riĉeco. Unu el la plej grandaj problemoj en nia instruado estas doni al la kursfinantoj motivojn plustudi aŭ ekapliki la lingvon. Ĝiaj kulturaj eblecoj estas unu respondo – pro la intima ligiĝo inter lingvo kaj kulturo, pro la ekspluateblo de artformoj (kanto, poezio, dramo) en la instruado, la Manifesto de Rauma nepre diras ion gravan al instruistoj.

Tamen, tiu dokumento lasas malplaĉan guston ĉe multaj, ĝuste pro la insisto pri forlaso de tiu nia plej sankta pracelo – ĕble la formulintoj volis tion fari por ŝoki la movadanojn en novan etapon kaj for el la psikologie malkomforta situacio aspiri ion ŝajne neatingeblan. Sed fakte la Manifesto starigas dilemon, elekto-devigon, tie, kie ĝi ne necesas. Estas tute eble samtempe kredi je la indo de universala ekuzo de Esperanto, kaj aktivi pri ĝia kulturo, sen kontraŭdiro. Jen temo frukto-done pliplukinda, ĉar spite ĉion, tiu obstina reteno de pracelo ne velkis tra la lasta jardeko, kaj tamen ni ankoraŭ ne solvis adekvate kiel rilati al ĝi.

Kaj nun pasis denove dek jaroj. Ni ne volas supertaksi la utilon aŭ rolon de Manifestoj, Deklaracioj, Alvokoj kaj Proklamoj, sed estas tamen oportune kapti la okazon de nordia kongreslando en 1991 kaj la fakton ke ILEI kongresas jubilee, por pritaksi tiujn dokumentojn, decidi kiom ili influis eventojn, kiom ili utilis, kaj kian mesaĝon ili portas al la nuntempa ILEI. Ni volas starigi debaton, dialogon inter niaj membroj kaj kongresontoj. Ni aperigos priteman artikolon en la numeroj de IPR ekde nun. Viaj reagoj estas tre bonvenaj. Ni tiel agu, ke la temo venu al Voss jam primaĉita kaj ne nur esotere – sed jam preta influi nian planadon por la sekvaj jaroj.


Komence de nova jardeko kaj estrara deĵorperiodo, estas tempo trovi novajn imperativojn aŭ dezirojn; kelkajn pozitivajn pensojn ni povos ĉerpi el la pasinto kaj ilin sintezi en tekston pli larĝan kaj utilan, solvante kelkajn el iliaj ŝajnaj kontraŭdiroj. Finfine, devas ebli diri ion definitivan pri la eterna batalo inter desupr- kaj desub-istoj, kaj inter la aplikistoj kaj la finvenkistoj.

Kiel instruistoj, ni nature emfazos en tiu diskutado la rolon de la instruado. Tio ne bremsu nin: Tireson naskis aro da politikaj aktivistoj, Rauman kultura koterio, kiuj ambaŭ vendis siajn partizanajn vidpunktojn al tutaj kongresoj. Se iu ajn havas la rajton oferti sian vidpunkton al la tuta komunumo, tio devus esti la instruistoj; ĉiu rekonas la eksterordinaran ŝarĝon sur lingvo-komunumo sen signifa denaska parolantaro pene krei siajn novajn generaciojn, kaj la kernan rolon de instruado en tiu neevitebla procezo.

Stefan MacGill, Hungario

La fervoja linio de Flåm...

...kiu pasas laŭ majesta montara valo, mallarĝa kaj abrupta, estas vera ĉefverko de la inĝenierado. Sur 20 km nur, ĝi malsupreniras de la stacidomo de Myrdal, je 867 m da alteco, ĝis Flåm, ĉe la bordo de Aurlandsfjord. La vojaĝo daŭras 45 minutojn. La trajno trairas 20 tunelojn, kies kuna longeco estas 6 km. La plej granda deklivo estas 1 m sur 18. La 865 metra diferenco je nivelo sur 20 kilometra vojo estas absoluta unikaĵo ĉe ordinara fervojo. En lokoj, kie la ĉirkaŭaĵo estas vidinda, la trajnoj malrapidiĝas, eĉ haltas por ebligi al la vojaĝantoj plej bone ĝui la imponan naturan pejzaĝon. Pro la deklivoj, la vagonoj estas ekipitaj per 5 apartaj bremsoj, kiuj kapablas eĉ aparte haltigi la trajnon.



Sur la unuaj kilometroj post Myrdal, la vojo kondukas sub neĝ-ŝirmiloj, preskaŭ paralele kun la linio de Bergen. De Vantnahalsen, oni havas grandiozan vidaĵon

sur la mallarĝan gorĝon de la valo de Flåm inter altaj pintoj kovritaj de eterna neĝo. Bela panoramo aperas inter Kjosfossen kaj la tunelo de Bakli kun kaskado, kies pluraj ŝtupoj estas enkadritaj per verdaĵo kaj per gigantaj montoj fone. Por venki la 300 metran diferencon de altitudo de Myrdalsberget, la trajno trairas serpentuman tunelon, tiel ke ĝi sekvas 5 trakojn unu sub la alia sur nura 1 kilometro, fluglinie. La plej longa tunelo troviĝas ĉe Nåli (1350 m). Guste antaŭ eniri ĝin, oni spertas la verŝajne plej fabelan vidaĵon de la tuta vojaĝo. La linio krociĝas sur la monto-flanko laŭ 3 etaĝoj (la trajno troviĝas sur la kvara), samtempe oni rimarkas la vojon kiu grimpas Myrdalsberget laŭ mallarĝ a vojo kun 21 kurbiĝ oj. Tiu vojo estis konstruita inter 1895–96 por la transportado de materialoj necesaj por la konstruo de la linio Oslo–Bergen. Ĉe Håreina la valo larĝiĝas kaj oni ekvidas la belajn farmojn kaj la preĝejon de Flåm. Oni estas tre proksima ankaŭ al la montoj Vobmesnosi kaj Rjoandefoss. Ĉe la piedo de milmetraj montoj, la stacidomo de Flåm ŝajnas ripozi ĉe la bordo de Aurlandsfjord, kiu estas brako de Sognefjord, la plej longa fjordo de Norvegio, kun 180 m da longeco. La fruktoĝardenoj de Flåm pruvas la mildecon de la klimato de la fjordo. En la riveron de Flåm, proksime al la stacidomo, salmoj kaj trutoj alnaĝas el la maro dum somero.

La trajnoj de la linio de Flåm trafikas kunlige kun la linio de Oslo–Bergen. Ankaŭ la ĉebordaj ŝipoj haltas en Flåm konforme al la trajnoj. La ŝosea atingeblo estas taŭga kunlige kun Aurland (kaj Vassbygdi) dum la tuta jaro kaj kun ligo dum la someraj monatoj al Laerdal per la nova vojo Aurland–Laerdal.

Tradukis Kovács Márta

Informoj, Novaĵoj

Dum la Tria Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto, kiu okazis en Beijing (Ĉinio) en majo 1990, d-ro Jiang Shuyun, rektoro de la Ĉina Sciencteknika Administra Universitato, anoncis ke lia Universitato kaj la Sciencteknika Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj kune fondis la Esperantan Sciencteknikan Instituton.

En ĝi troviĝos studentoj kiuj studos sciencojn kaj Esperanton dum 2–4 jaroj. Ekzistos en la komenco kvin studfakoj, nome bioinĝeniero, ekologio-medio, akupunkturo-masaĝo, dietistiko kaj internacia ekonomio-komerco.

Samtempe la Universitato intencas kunlabori kun la Scienc-teknikista Esperanto-Asocio por kune fondi Internacian Universitaton Verda Stelo esperantlingva, kiu varbos studentojn tra la tuta mondo.

Por ĉi tiu projekto, la iniciatintoj kalkulas je apogo de la esperantistaro.

Kontakadreso: Prof. Shen Chenru
STEA/ Academia Sinica, 52 Sanlihe, CN-100864 Beijing.

Cseh-kurso

Okazis Cseh-kurso kaj ekzameno en la Universitato de Padova (Italio), dum la 61-a Itala Kongreso de Esperanto. La 12-horan kurson partoprenis 17 personoj el tri landoj. La gekursanoj montris grandan intereson kaj al la lingvo, kaj al la movado. La kurson sekvis tre serioza kaj kompleksa ekzameno por testi gramatikajn konojn, skriban kaj parolan kapablojn.

Carla De Lorenzi

Raporto pri la Interetna Vortaro de Ordinara Esperanto

(kompilata sub la aŭspicio de ILEI)

La laboro progresas malpli rapide ol antaŭvidite. La nuna stato, meze de junio, 1990 estas, ke kompilado de artikoloj pri la **a-** vortoj estas finita, kaj superrigardo pri la **b-**vortoj estas en malneta formo. Malneta elpreso de la **a-**vortoj estas sendita jam al kunlaboranto en Svedio, por detala superrigardo.

La ĉefkompilanto donis tri prelegojn pri la projekto; post la prelegoj pluraj interesaj proponoj estis faritaj, kaj novaj ideoj levitaj. Sekvo de tiuj proponoj estas, ke la serio de artikoloj por la **a-**vortoj estis dufoje komplete kontrolita kaj amendita, parte por elsarki nekonsekvencaĵojn en la traktado de parencaj vortoj, antonimoj, kaj tiel plu, kaj parte por atingi pli fidindan sinsekvon de la vortoj kiel vortoj, anstataŭ kiel radikoj.

La nombro de artikoloj en la serio de **a-**vortoj estas 360, kaj pli ol 300 vortoj estas flankenmetitaj en la listo de fakteknikaj vortoj. Krome, multaj memstaraj derivaĵoj aperas apud la artikolo por la ĉefa vorto. La takso, do, estas ke la fina verko enhavos inter kvar mil kaj kvin mil da kapvortoj, kiu estas iom pli ol unue antaŭvidite.

Ni provas elpensi modernajn uzekzemplojn, kaj aludi kiel eble plej ofte al lastatempe ĉiutagaj parencaj vortoj. Sed kun tiu sinteno venas la timo, ke tro eblus pufigi la verkon ĝis tro granda amplekso.

La fona filozofio pri la verko iom modifiĝis. Krom la celo kompili vortaron, kiu estos manlibro pri la ĉiutaga lingvo por lernantoj, ni nun havas en la fono la ideon, ke la verko estu vera instruilo por la lernantoj, subtenilo por la instruanto. Por servi tiel, ni elpensas multe pli da parencaj vortoj, ol aperas en, ekzemple, Plena Vortaro, kaj indikas taŭgajn kazojn de uzo de, ekzemple, la **mal-**prefikso.

La subteno de ILEI estas grande aprezata. Tri novaj kunlaborantoj, el kiuj du jam grande kontribuis per konsiloj sekve de kontrolado, venis rekte kiel sekvo de la apero, en IPR, de eseo pri la projekto.

Lawrence MEE

Akademia Internacia de la Sciencoj: San Marino

RUSA AIS SESIO

Laŭ decido de UN/UNESKO la jaroj 1988/1997 estas deklaritaj "MONDA JARDEKO POR KULTURA EVOLUO". Unu el aranĝoj de la Jardeko estos la Rusa Sesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino laŭ temo "LINGVO-KULTURO-EKOLOGIO". Ĝi pasos en Moskvo ekde 29.12.1991 ĝis 07.01.1992 kaj havos por dezirantoj ekskurson al Leningrado – 01–08.12.1991.

Diference de la tradiciaj AIS-sesioj, kiuj pasas plejparte kiel universitat-nivelaj stud-kursoj, en la Rusa Sesio estos akcentataj la scienca kaj kultura programoj, realigotaj en formo de la Internaciaj Konferenco kaj Festivalo de la Rusa Arto. Ambaŭ programoj per rimedoj de la scienco kaj de la arto celas kontribui al la ĉeftemo de la sesio – "Lingvo-Kulturo-Ekologio" – per:

– ellaboro de nova kultura paradigmo, kiu traktas la lingvon, kulturon kaj naturon kiel nedisigeblan tuton;

– analizo de fenomeno de la rusa kulturo surfone de kelkaj plej gravaj mondaj problemoj – mondaj komunikado, konservo de la kvalito kaj varieco de la viv-medio: natura kaj socia kun la spirita.

La sesia laboro kaj publicaĵoj estos du-lingvaj: rusaj kaj E-aj. En unu el ili (aŭ eĉ pli bone en ambaŭ) ni atendas de vi la sciencajn kaj artajn kontribuaĵojn. La resumon de la prelego (eĉ se vi ne sukcesos veni) necesas sendi ĝis januaro 1991, la prelegon – ĝis januaro 1992. Ili estu tajpataj kun 1.5 interspacoj en kadroj 25x17 cm; resumo – sur 1-2 paĝoj, la prelego – sur 10 paĝoj. Sub la titolo estu la nomoj, sciencaj gradoj, landoj de la aŭtoroj; piednote – iliaj oficejoj, adresoj, telefonoj.

Oni povas partopreni kaj pagi la tutan sesion aŭ ties partojn.

La unua parto dum la unuaj 4 tagoj kaj en tago de la ortodoksa Kristnasko, la 7-an de januaro, estos dediĉita ĉefe al Festivalo de la rusa arto kaj vizitoj al muzeoj, teatro, al la antikvaj rusaj urboj Suzdal, Zagorsk; la dua parto – dum 02–06.01.1992 – estos la scienca konferenco; la tria – dum 08–12.01. – Leningrada ekskurso. Pagi oni povas al: poŝtĝirkonto 2051-305 ĉe poŝtoficejo Hannover, BLZ 25010030, "EKE, organizejo RAISS" laŭ jenaj tarifoj:

Kostoj en DM aŭ egalvaloro	ĝis01.03	01.09	01.12	poste
		Aliĝkotizo		
Plena	80(30)	100(50)	140(90)	160(110)
Por nepagipovaj landoj	40(15)	50(25)	70(45)	80(55)
	Moskvaj loĝado, manĝo, ekskursoj			
Plena dum 10 tagoj	420	500	600	700
Por nepagipovaj landoj	210	250	300	350
Per reciproka gastigado	21	25	30	35
	Leningrada ekskurso kun voj-elspezoj			
Plena dum 5 tagoj	300	350	400	450
Por nepagipovaj landoj	150	175	200	225

La kostoj en krampoj estas aliĝkotizoj sen ricevo de la Resumaro, RAIS-Aktoj, AIS-broŝuro, Ekologia Terminaro 6-lingva.

Ĉiujn materialojn kaj demandojn adresu al la Rusa AIS-sesia komitato: SU-103001 Moskvo, Sadovaja Kudrinskaja, 18, "Russkaja sessija MAN" Fakso: 7095-2003262, Telefonoj: 7095-2913018, -2448024, -1870222, -1833423.

Vic-prezidanto de la komitato, direktoro de Centro "Esperanto-Kulturo-Ekologio"
d-ro Lev Medvedev

Ni mencias...

Instruprogramoj el Bulgario.

"Estas konata la fakto, ke el preskaŭ 10 000 e-istoj en nia lando malmultaj parolas *bone* (eĉ ne temas pri *perfekte*) la Internacian Lingvon. Certe tio estas rezulto ĉefe de la ĝisnunaj instruprogramoj, en kiuj svarmas la teoria kaj klasifika gramatiko kaj preskaŭ mankas konoj pri historio kaj nuntempa stato de nia movado kaj ties praktikaj valoraĵoj, pri la E-literaturo, kio multe helpus la pliinteresigon kaj enmovadigon de komencantoj." Laŭ tiu principo naskiĝis la novaj projektoj (pri akcepto ni ankoraŭ ne scias) pri instruprogramoj por tri gradoj. Pro tre laŭdinda strebo al unueco, ili abunde ĉerpas el la specimenaro de la Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI kaj konformiĝas al ties postuloj. Detala recenzo pri skiza varianto far la redaktoro de IPR aperos en *Bulgara Esperantisto*.

Esperanto en Azio (nro 2, aŭg. 1990)

Dekpaĝa raporto, redaktita de la aktivulo Joachim Werdin, pri la stato de instruado kaj de la movado en Azio: Tajvano, Bharato kaj Malajzio ĉi-numere. Gia celo estas "kunlaborigi kaj aktivigi ĉiujn homojn serioze interesatajn de la Azia E-movado". Ĝin ricevos "nur tiuj legantoj, kiuj kontribuos per artikolo aŭ almenaŭ konfirmos sian sinceran volon daŭre ricevadi la bultenon pro sia interesateco kaj kunlaboremo". Viajn rimarkojn sendu ne al la daŭre vojaĝanta redaktoro, sed al la UEA-estrarano pri Azia movado, prof. D-ro So Gilsu, rok 158-600 Yangchon p. o. k. 11, Seoul, Korea Respubliko.

Iwona Strachanowska: Wybrane metody nauczania jezyka Esperanto. Materialy pomocnicze dla studentów miedzywydzialego fakultetu metodyki jazika esperanto. *(Elektitaj metodoj por la instruado de Eo. Helpmaterialoj pri la metodiko de Eo por la studentoj de la interscienca fakultato) Bydgoszcz, 1990.*

Destinita al la anoj de la interscienca fakultato pri Eo en la Pedagogia Altlernejo de Bydgoszcz, la mimeografiaĵo pritraktas en kvar ĉapitroj, en la pola lingvo:

– la historion de planlingvaj projektoj;

– bazajn nociojn de lingvistiko, interlingvistiko kaj E-ologio;

– la bazajn ecojn de la instruprocezo, kun akcentoj pri interfero, la Cseh-metodo kaj didaktikaj ludoj;

– la diversajn lingvoinstruajn metodojn, laŭ la aŭtorino ne sufiĉe konatajn al Eo-instruistoj. (*Laŭ anglalingva resumo ricevita*)

40 paŝetoj al plua posedo. Adaptis: L. Lentaigne (laŭ ideo de Cl. Cayzac).

La unuan eldonon, limigitan, ricevis nur la abonantoj al la "Broŝur-servo" de la revuo *Laŭte*. Nun la aŭtoro sin demandas, ĉu indas eldoni ĝin duan fojon. Tio dependos nur de Viaj reagoj. Gi ĉefe (sed ne nur) utilas al franclingvanoj, ĉar oni povas legi spegule helpan tradukon de la originalaj prozaĵoj kaj poemoj, tradukoj kaj anekdotoj en tiu lingvo. La celo de la taŭge poŝformata libreto, kiu kostos nur 10 frankojn, estas instigi REKTE PENSI EN ESPERANTO. Reagu ĉe *LENTAIGNE, 3 Av. de la Gaillarde, 34000 Montpellier, Francio*. (laŭ varboteksto ricevita)

Félix García Blázquez: Skizo por racia teorio de vortigado, 2-a eldono, 1987. 106 p. Prezo ĉe UEA: 18 gln.

La aŭtoro traktas, je niveloj elementa, meza kaj supera, la temojn de prefiksado, sufiksado, rekta derivo, kunmetado kaj vortanalizo. Ĝi povas esti utila al tiuj, kiuj sin preparas al unu el al tri niveloj de Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI.

Zsuzsa Barcsay: Transfera valoro de la lingvo Esperanto por hungaroj en instruado kaj lernado de hindeŭropaj lingvoj. En: Idegen nyelvek tanítása *(Instruado de fremdaj lingvoj)*, **1989/3, pp. 69-77.**

Tiu hungara varianto de studo jam aperinta en Eo (*Metodiko en praktiko*) atingas potenciale ĉiujn instruistojn de fremdaj lingvoj en Hungario. Per komparo de la frazo: *Sur la neĝkovrita deklivo de la monto multe da gajaj infanoj sledas* en la lingvoj hungara, rusa, germana, franca kaj Eo la aŭtorino demonstras la relative pli grandan propedeŭtikan utilon de Eo je la niveloj akustika-grafika (skribado de sonoj diferencaj de la hungara), morfologia (prepozicioj, vortformado, ktp.), sintagmatika (akordigo de adjektivoj kaj substantivoj, esprimo de poseda rilato ktp.) kaj leksika (komunaj hindeŭropaj vortoj). La komune hindeŭropaj ecoj, fremdaj al la hungara, pli rapide kapteblas en Eo, kie oni pli facile koncentriĝas al la esenco de tiuj diferencoj.

Periodaĵoj en aŭ pri Esperanto kaj aliaj planlingvoj, organo de Rondo Takács, nro 1, nov. 1990.

"En 1991 ni aperigos – en formo de 6 revuo-numeroj – la ĝis nun trovitajn pli ol 6 mil titolojn de periodaĵoj en aŭ pri Eo. En 1992 sekvos bibliografio de nacilingvaj periodaĵoj kun E-rubriko kaj tiu de aliplanlingvaj periodaĵoj, krome diversaj indeksoj."(letero de la redaktoro, Árpád Máthé) "Per tiu ĉi organo ni ŝatus inviti por kunlaboro ĉiujn bibliografiemajn kolegojn, historiistojn de planlingvaj movadoj, redaktorojn de planlingvaj periodaĵoj kompletigi nian – certe mankohavan – liston. Fine de septembro 1990 en nia slipara katalogo oni trovas informojn pri 7051 planlingvaj periodaĵoj. Por la estonta eldono ni ŝatus kompili kiel eble plej kompletan *katalogon de la planlingvaj periodaĵoj*." Abontarifo: 36 guldenoj por 1991 (UEA-kodo: rntk-u). (El la 1a nro, kiu enhavas imponajn grafikaĵojn pri "Nombro de periodaĵoj en aŭ pri planlingvoj")

L'esperanto. Revuo de Itala Esperanto-Federacio, speciala numero aŭg/sept. 1990: Il valore propedeutico dell'Esperanto (*Edward Symoens: La propedeŭtika valoro de Esperanto*).

Eŭropa Esperanto-Unio, kunlabora organizo de la E-asocioj en landoj anaj al la Eŭropa Komunumo, celas publikigi, en pluraj lingvoj, diversajn dokumentojn rilatajn al la lingva problemo en Eŭropo, por la atento de la "tutEŭropaj" instancoj. Ero de tiu agado estas la itallingva apero de la reprezenta verko de nia ILEI-prezidento. Tre sistema, tre bone dokumentita per abunda bibliografio, la studo havas demonstran valoron por la "ekstera mondo", kvazaŭ propedeŭtike por plu-lego pri la lingva problemo kaj Esperanto.

Ne forgesu: la menciita verko haveblas Esperante, angle, france, nederlande ĉe UEA kaj FEL. Nepra teksto por agi en pedagogia medio!

HONORAJ MEMBROJ

Peter Zlatnar (YU, 1984) – Mario Dazzini (I, 1985) – Erbetta Marcel (CH, 1986)
Irja Klemola (SF, 1986) – Olle Olsson (S, 1986) – Jozef Toczyński (PL, 1986)
Helmut Sonnabend (D, 1987) – Catina Dazzini (I, 1988) – Szerdahelyi István (H, 1988)
M.H. Saheb-Zamani (IR, 1989)

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Argentino	: Herminia Kirkerup de Fernandez (s-ino), Calle Cerrito 1.249, Barrio San Martín, RA-5000 Córdoba, (Córdoba)
Aŭstrio	: Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien
Belgio	: Marc Demonty, Schoolstraat 3, B-1700 Dilbeek
Brazilo	: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 São Paulo SP
Britio	: Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 82D
Bulgario	: Ivanka Spasova, j.k. Lenin bl. 20, vh. 3, BG-1124 Sofia
Ĉeĥio	: Vêra Barandovska, Volgogradská 41, CS-70400 Ostrava 3
Ĉinio	: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normal University, 430070 Wuhan, PR China
Estonio	: Palu Johannes, Solme 21, SU-200016 Tallinn, Estonio
Finnlando	: Synnöve Mynttinen, Pursimiehenkatu 12 B 46, SF-00150 Helsinki
Francio	: Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim
F.R. Germanio	: Stefanie Tucker, Alatseestr. 14, D-W-8900 Augsburg
	: Till-Dietrich Dahlenburg, Feldstr. 13, D-O-2722 Brüel
Hispanio	: Manuel López Hernández, Poştkesto 832, E-41080 Sevilla
Hungario:	: Márta Kovács, Ady E. u. 23-25/C, H-1221 Budapest
Israelo	: Murĵan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv
Italio	: Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa
Japanio	: Toi Kunio, 1448-1 Simotakajyanagi, Kazo-si, Saitama 347
Jugoslavio	: Sonja Tavčar, Liminijanska 6, YU-66320 Porotorož
Korea Resp.	: Gilsu So, Sodaemun, P.K. 59, Seoul-120
Nederlando	: D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, NL-8162 NC Epe
Nordameriko	: Doroteo Holland-Kaupp, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono
Norvegio	: Åge Melå, Beverstien 2, N-3190 Horten
Pollando	: *Vakas*
Portugalio	: Alexandre Kasesa, Rua Actriz Palmira Bastos 10, 4'B, P-1900 Lisboa
Sanmarino	: Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, I-43031 San Marino
Slovakio	: Anton Zachariáš, Sobotské námestie 6, CS-05801 Poprad
Sud-Afriko	: Japie Spoelstra, Posbus 20185, Noordbrug 2522, Suid-Afrika
Svedio	: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby
Svislando	: Edgar Jobin, F.W. Dubois 11, CH-2400 Le Locle
Venezuelo	: Inĝ. Felix Garcia Blasquez, Apartado 75.090, YV-1070 A Caracas
Zairio	: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre)

REPREZENTANTOJ

Bangladeŝo : Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000
Centrafrika Resp. : Luc Feidangai, B.P.960, Bangui
Ĉilio : Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago
Hindio : Abani Halter, Jamboni, P.O.Bolpur 731204, W. Bengal
Irano : Mohammad Karamudini, P.O.Box 13445-747, Tehran/Iran
Niĝerio : Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Ekpoma Bendel
Tanzanio : Mramba Simba, S.L.P. 1051, Bunda Mara

LABORKOMISIONOJ

Statistiko : Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, B-8400 Oostende
Tel. (059) 70.87.00

Didaktikaj lud(il)oj : Georges Sossois, rue du Basson 79, B-6001 Marcinelle
Tel. (071) 43.62.05

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO : (Rilatoj de reciproka informado, Kategorio C)
: 7 Place Fontenoy, F-75007 Paris.
Reprezentantoj de ILEI:
James Fairbank, 6 Avenue Th. Rousseau, F-75016 Paris
François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, F-75010 Paris

UEA : Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

IEI : Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag

KCE : Kultura Centro Esperantista, BP 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

Kontribuaĵoj al IPR

tajpitaj kun duobla interspaco kaj marĝenoj, al la adreso de la Redaktejo (vd. kovrilpaĝon)

Abonado al IPR kaj membriĝo al ILEI:

(membrokotizo 40 Svedaj Kronoj)

1) poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). «La Internacia Ligo de Esperantistaj Instru-istoj» (ILEI). Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby (Svedio).
2) poŝtĝirkonto: 3789 64 de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando), por la interna konto ILEK-A de ILEI.